

# KATALUNA ESPERANTISTO\*

\*Llengua internacional i drets lingüístics

---

NUMERO 351-352  
(117-118)  
KVINA EPOKO  
JULIO-DECEMBRO 2009

---

- > KEA-agado por lingva diverseco
  - > En someraj universitatoj
  - > En la nacia histori-muzeo
  - > Trioble en la telenovaĵoj
  - > Nova KD de Kaj Tiel Plu
  - > Galceran Ferrer, defendanto de Ferrer i Guàrdia
- 

- > Llengües austronèsies, papús i australianes
  - > Zamenhof i Braille
- 

ESPERANTO\*  
CAT

\*Asociació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

A Giridhar Rao\*

## DRETS HUMANS LINGÜÍSTICS A L'ÍNDIA: LA BRETXA ENTRE LA POLÍTICA I LA PRÀCTICA

*A l'Índia, malgrat haver-hi bones polítiques per a tractar el plurilingüisme del país, l'estat de moltes llengües, tant de grans com de petites, no és bo. A més, les llengües de les minories i dels indígenes pateixen per culpa d'un sistema educatiu que no sols és de baixa qualitat, sinó que, a més, sovint es fa en una llengua que no és la materna dels alumnes: vet aquí la "bretxa" del títol. Aquest assaig mostra un esbós del paisatge lingüístic complex que hi ha a l'Índia i, més endavant, enumera algunes polítiques lingüístiques del govern. Una secció posterior informa d'alguns dels perills que corre la diversitat lingüística del país. En el quart capítol "retratem" el sistema educatiu indi. L'assaig presenta tres iniciatives prometedores que mostren camins per a continuar endavant. Les solucions inclouen: informacions més fidels sobre les llengües al país; un suport més efectiu perquè el plurilingüisme germeni i, més important, una millora del sistema educatiu estatal. Aquests passos contribuiran tant a una societat que respecti els drets humans lingüístics com a una evolució sostenible del país.*

Pàgines 21 a 27

Resumo sur paĝo 27

\* El Dr. A Giridhar Rao és secretari general de la Federació Esperantista Índia i professor convidat a la universitat de Hyderabad. Aquest article correspon a una de les seves conferències en el proppassat Congrés Català d'Esperanto a Sabadell.





## ASOCIAJ FORTOJ BEZONAS REDISTRIBUON

**A**ntaŭ pluraj jaroj, nia asocio elektis tre postuleman vojon: parte profesiigi nian strukturon por certigi daŭran kaj regulan aktivadon kaj laŭeble levi ĝian nivelon. La veto estis komplika, ĉar ĝi ne baziĝis sur registaraj subvencioj, sed sur niaj propraj kotizoj kaj donacoj, kiel societanoj. Sekve, laŭlonge de la lastaj jaroj la membrototizo draste altiĝis: fakte ne nur por pagi ĉ. 3000 eŭrojn jare por nia partatempa dungito, sed ankaŭ por plimultiĝi nian eldonkapablon kaj la senpagan distribuon de niaj eldonaĵoj tra bibliotekoj kaj asocioj ĉie tra la katalunlingvaj landoj, akiri pli grandan videblecon kaj provi altiĝi nian prestiĝon.

La rezultoj de tiu agado aperas ĉiunumere en la paĝoj de ĉi tiu revuo kaj estas diskutataj de asocioj en la jara asembleo (bedaŭrinde, ne pli ol dudeko). Ŝajnas, ke efektive la videbleco kreskis, ĉar plioftiĝas la okazigo de prestiĝaj aranĝoj (i.a. rondaj tabloj kun elstaruloj aŭ solenaĵoj en la barcelona urbodomo, la nacia histori-muzeo aŭ la medicina akademio). Aliflanke montriĝas, ke el tio ne rezultas kresko de la membraro, kiu delonge stagnas, eĉ lastatempe montriĝas eta regreso (parte antaŭvidita pro la kotiz-altigo). Alvenas ja novaj kunmembroj, sed

ilia nombro nur ekvilibrigas (kaj lastatempe eĉ ne) tiun de la ekzistintaj (plej ofte, sed ne nur, pro forpaso). Sekve, la mezuma aĝo de la membraro, kiu longe restis stabila, ŝajnas ekaltiĝi.

El tio verdire sekvas problemoj: pli granda eldonado, pli multaj kontaktoj ktp. postulas pli da laboro, sed la stagnado en la laborfortoj kondukas al stagnado en la nove atingita agadŝtupo. Eĉ plie: Pliiĝiĝo de la membraro signifas fakte malkreskon de la aktivularo en la plej engaĝiĝema aĝo. Krome hantas alia timo: eventuala malpli granda sindevigo de la membraro, kiu eble facil-anime emas kredi, ke la plimulton de la asocia laboro surprizus dungito. Tia penso estus ne nur tute malreala, sed ankaŭ ege malsaĝa: la asocia agado tre larĝe plejparte dependas de la engaĝiteco de la samasocioj.

Ĝuste la bedaŭrindan malfruon de ĉi tiu tria numero de la jaro de la revuo, kiun fine la estraro decidis kunigi kun la jarfina, oni povus taksii kiel rezulton de manko de engaĝiteco aŭ de supertaksado de la asociaj fortoj, kiuj bezonas redistribuon.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: A Giridhar Rao, Assumpta Mascaró, Christian Pinard, Dani Cortijo, Darío Rodríguez, David García Falcó, Elisabet Abeyà, Éric Collignon, Ferriol Macip, Guillem Sevilla, Jesús García, Joan Inglada, Josep Enric Peres i Blesa, Josep Franquesa, Llibert Puig, Mon Cardona, Montserrat Franquesa, Pedro Zurita, Ramon Riera, Sílvia Simó, Víctor Solé

### Kataluna Esperanto-Asocio:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2009: individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; individua dumviva membro, 1280 eŭroj; kolektiva membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 001, Barcelona  
kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
Konto UEA: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera, Víctor Solé.  
Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Òscar Puig.

### Kataluna Esperantisto:

Provizora ĉefredaktoro: Hèctor Alòs i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

### Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: joves@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/joves  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 002, Barcelona  
kontonumero: 3025 0002 47 1433276794  
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Aida Sunyol, Anna Raventós, Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

# KEA-AGADO POR LA LINGVA DIVERSECO\*

**0. Starpunkto kaj motivoj de Kataluna Esperanto-Asocio.** Kataluna Esperanto-Asocio taksas la disvastigon de esperanto vojo jam iritan kaj sentas la bezonon fari pluan paŝon. Tial KEA elektis labori super la lingvaj rajtoj, integrite en la socio, el kiu ĝi naskiĝis, la kataluna, kaj tirante profiton el sia sperto kaj rimedoj:

**La (soci)lingvaj konoj kaj la internacia helplingvo esperanto.** La parolantoj de la kataluna lingvo konis la malpermeson de sia lingvo jam de antaŭ jarcentoj, tial katalunoj, parolantoj de esperanto aŭ ne, estas speciale sentemaj pri la lingvaj temoj. Malrespekto al la lingvaj rajtoj estas bedaŭrinde tro ofta tra la mondo. KEA publikigas en la kataluna tekstojn pri (soci)lingvaj rajtoj kaj instigas la debaton pri tiu temo en la esperanta komunumo. La intereso de KEA pri tiuj temoj estas evidenta, kiam oni relegas ĝian longvivan gazeton *Kataluna Esperantisto*, ĉefe tiujn numerojn aperintajn en la lastaj jaroj. En la kvar sekvaj apartaĵoj mallonge prezentiĝos kvar aktiveroj de la asocio.

**1. Celoj, valoroj kaj principoj de KEA.** La 1an de marto 2008 la asembleo de KEA aprobis la dokumenton titolitan “Celoj, valoroj kaj principoj de Kataluna Esperanto-Asocio”. Malneto malfermita al diskuto kaj poste amendita aperis en *Libera Folio* kaj sukcesis krei iom da debato. Por ilustri ĝian spiriton ni sekve kopias du el ĝiaj valoroj:

- a) La lingvaj rajtoj, komprenataj kiel nedisi-gebla komplemento de la homaj rajtoj.
- c) La rajto al plena komunikado inter homoj kun diversaj lingvoj, kiel rimedo por venki la antaŭjuĝojn, survoje al packulturo.

**2. Aro da kolokvoj sub la ĝenerala titolo “Lingvoj, diverseco kaj paco”.** La organizo de serio da tri kolokvoj sub la ĝenerala titolo “Lingvoj, diverseco kaj paco” volis viciĝi en la Internacia Jaro de la Lingvoj proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi funkciis kiel antaŭkongreso de la Kataluna Kongreso de Esperanto okazinta komence de decembro 2008.



*La organizo de serio da tri kolokvoj sub la ĝenerala titolo “Lingvoj, diverseco kaj paco” volis viciĝi en la Internacia Jaro de la Lingvoj proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. Arcadi Oliveres, Fèlix Martí, Maria Àngels Viladot kaj Jordi Armadans finis la ciklon*

Partoprenis en ĝi socilingvistoj, responsuloj de la lingva fako de la kataluna registaro, la direktoro de Fundació per la Pau [“Fondaĵo por la Paco”], la direktoro de Linguamón (ankaŭ nomata “La domo de la lingvoj”) kaj ĵurnalistoj. Entute 12 gravaj personoj el la kataluna socio. La nombro de la ĉeestanta publiko estis kontentiga se konsideri la fakecon de la temo.

**3. Kolekto “Delfi Dalmau”.** Sub la nomo “Kolekto Delfi Dalmau” kuniĝas broŝuroj eldonitaj de KEA. Temas pri tekstoj en la kataluna lingvo rilataj al la lingvaj rajtoj kaj al la lingva diverseco, konsiderantaj la internacian lingvon. Per sia nomo ĝi starigas omaĝon al Delfi Dalmau i Gener (1891–1965), pedagogo kaj lingvisto, fondinto de reto de edukcentroj, prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio dum la 1920aj jaroj kaj pioniro de la

**KEA taksas la disvastigon de esperanto vojo jam iritan kaj sentas la bezonon labori super la lingvaj rajtoj**

\*Dokumento prezentita de KEA en la pasinta Universala Kongreso en kunsido pri “Esperanto-movado en diskutoj pri lingvaj rajtoj”





KEA volas ne nur laŭdi la lingvan diversecon, sed efektive kunkonstrui ĝin

**Oni komencas kalkuli pri nia asocio en la ĝenerala socio, kiam temas pri lingvaj aferoj**

sociolingvistiko en Katalunio. Jam aperis kvar kajeroj kaj iliaj enhavoj inkluzivas:

- Tekston de la brita lingvisto Robert Phillipson, eksa altnivela funkciulo de The British Council.
- Intervjuon de la lingvistoj François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke al André Martinet, unu el la plej elstaraj lingvistoj de la 20a jarcento kaj aparte ligita al planlingvoj.
- Dialogon de la lingvistoj István Ertl kaj François Lo Jacomo kun la mondfama

semiologo Umberto Eco, kiam ĉi tiu okazigis sian prelegserion en Parizo pri “la serĉado de perfekta lingvo en la eŭropa kulturo”.

- Artikolojn pri lingvaj rajtoj aperintajn en *Kataluna Esperantisto*.

**4. “Estu lingve daŭripova”.** “Estu lingve daŭripova” estas dokumento celanta plivalorigi la lingvan diversecon ĉe la universitatoj kaj doni praktikajn konsilojn por kontribui al ĝia plutenado.

Antaŭ kelka tempo kontaktis nin Albert Servitje, respondeculo de la Lingva Kabineto kaj kunordiganto de la programo de Lingva Volontularo, el la Universitato Pompeu Fabra. Li demandis, ĉu ni pretus fari tradukon al esperanto de la dekalogo “Estu lingve daŭripova”, preparita de Esplor-Grupo pri Minacataj Lingvoj de Universitato de Barcelono (*GELA - Grup d’Estudi de Llengües Amenacades*) okaze de Internacia Jaro de Lingvoj, kun la apogo de la fako pri Lingvaj Servoj de diversaj katalunaj universitatoj. Efektive ni faris la tradukon kaj estis invititaj al la podio por ĝia oficiala prezentado.

Tio pravas, ke oni komencas kalkuli pri nia asocio en la ĝenerala socio, kiam temas pri lingvaj aferoj. Tial ni opinias, ke niaj klopodoj celas la ĝustan direkton. □

## ELSTARA PARTOPRENO EN UK

**K**EA havis elstaran intervenon en la pasinta 94a Universala Kongreso en Bjalistoko.

Denove nia Asocio partoprenis en la Movada Foiro, kiu rekorde arigis 84 budojn el landaj kaj fakaj asocioj. Deĵoris



Alex Humet emfazis la principojn kaj agadojn de KEA rilate lingvajn rajtojn

Josep Franquesa, Montserrat Franquesa kaj Quim Gestí, kiuj prezentis niajn eldonaĵojn: librojn, kajerojn de la Kolekto Delfi Dalmau, numerojn de nia revuo kaj afiŝon de la Universala Kongreso en Barcelono en 1909. Ĝis dek ekzempleroj de tiu ŝildo estis venditaj al interesitaj vizitantoj.

Kadre de la t.n. “Kleriga Lundo” kaj sub la gvido de Kimura Goro, estis organizita kunveno pri la temo “Esperantomovado en diskutoj pri lingvaj rajtoj”. Reprezentante nian asocion, parolis Àlex Humet, kiu emfazis la principojn kaj agadojn de KEA rilate lingvajn rajtojn, montrante al la publiko numerojn de nia revuo klarigantajn la asociajn principojn kaj celojn. (Legu la raporton ĉi-sekve)

Tri tagojn poste, la jaŭdon, kadre de la premiad-ceremonio de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj okaze de la cent-jara jubileo de la Internaciaj Floraj Ludoj, Josep Franquesa prezentis historian superrigardon al la beletra festo. Fine la poemo de Marie Hankel “Simbolo de la amo” estis deklamita de la kroata verkistino Spomenka Štimatec. (Legu la prezentitan raporton sur la paĝoj 5 kaj 6)

Paralele al la Universala Kongreso, funkciis, kiel en la lastaj jardekoj, Internacia Infana Kongreseto, kies programo aparte viglis ĉi-jare. En ĝi denove partoprenis Andreu kaj Joan Gestí inter 36 geknaboj inter 6- kaj 17-jaraj.

jf / mf / red

# LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ KAJ ILIA UNUA FESTO DUM LA 5a UNIVERSALA KONGRESO EN BARCELONO EN 1909\*

**Ĝ**uste antaŭ cent jaroj okazis la unuaj internaciaj Floraj Ludoj dum la Universala Kongreso en Barcelono. Ili estas la plej fama precedento de internaciaj literaturaj konkursoj en esperanto kaj konkrete de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĉi tiuj komenciĝis en la nuna formo en 1950.

## 1. Historia trarigardo

La Internaciaj Floraj Ludoj estis beletra konkurso. Ilin iniciatis Frederic Pujulà i Vallès en 1908 kadre de la redakcio de *La Revuo*, lige kun la baldaŭa Universala Kongreso en Barcelono. La ĉeflaŭreato en 1909 estis la germana poetino Marie Hankel. La nomo de la konkurso devenas de la okcitanaj kaj katalunaj Floraj Ludoj, mezepoka beletra-konkurso, reprenita en la 19a jc., okaze de la literatura renaskiĝo de ĉi tiuj lingvoj.

Post la mondmilita paŭzo la konkurso daŭris kiel internacia iniciato administrata de la kataluna esperantistaro. Dua paŭzo okazis inter 1928 kaj 1933, kiam la ludoj ne plu rajtis okazi pro denuncado de esperantistoj kontraŭaj al la kataluneca karaktero de la organizado. Trian, multe pli longan paŭzon kaŭzis la civila milito en 1936 kaj la frankisma diktaturo.

Post la falo de la Franko-reĝimo Kataluna Esperanto-Asocio relanĉis la konkurson en 1978, en kiu en postaj jaroj kunlaboris la Kooperativo de Literatura Foiro. En tiu ĉi nova epoko ĝi ne estis limigita al poezio, kaj la trifojaj gajnintoj de la ĉefa premio (Natura Floro) ricevis la titolon de Florluda Majstro: tiaj estas Timothy Brian Carr, Bernard Golden, Giorgio Silfer kaj Krys Ungar. Aliaj premiitoj estas Kris Long, Aldo de' Giorgi, Jiří Kořínek, Nicolino Rossi, Gonçalo Neves, Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj István Ertl.

La konkurso ĉesis okazi de post 1993 pro la malnoviĝinta karaktero de la festo kaj ĉar oni



*La unuaj Floraj Ludoj okazintaj en la Universala Kongreso de Barcelono mirigis la ĉeestantaron pro sia pompo*

proponis, sub alia nomo, alternativan premion, kiu ne sukcesis enradikiĝi.

## 2. La antaŭmilita periodo de la Internaciaj Floraj Ludoj

La unuaj Floraj Ludoj okazintaj en la Universala Kongreso de Barcelono mirigis la ĉeestantaron pro sia pompo. Tio igis, ke ilia organizado estis reprenita du jarojn poste, ekde 1911, fare de la Kataluna Esperantista Federacio kun la apogo de *La Revuo*, kiu reklamis ilin kaj aperigis sur siaj paĝoj la ĉefajn premiitajn verkojn.

Indas rimarki, ke la Internaciaj Floraj Ludoj havis 10–20–30 premiojn, depende de la jaro, ĉiujn mone rekompencatajn, kvankam plej ofte per malgrandaj sumoj. La serĉado de patronoj estis grava tasko de la organizantoj de la premioj kaj de la lokaj organizaj komitatoj de la katalunaj kongresoj de esperanto, en kies kadro ili okazis. Tial la premiojn ofte rekompenc-

***Internaciaj Floraj Ludoj estas la plej fama precedento de internaciaj literaturaj konkursoj en esperanto***

\* Teksto pretigita de KEA kaj legita dum la pasinta Universala Kongreso dum la premiad-ceremonio de la Belartaj Konkursoj okaze de la cent-jara jubileo de la Internaciaj Floraj Ludoj

cis esperanto-asocioj —inkluzive de esperantistaj grupoj el diversaj urboj kaj urbejoj de Katalunio—, unuopaj esperantistoj —enlandaj aŭ alilandaj—, lokaj aŭtoritatoj aŭ kleruloj, lokaj societoj aŭ firmaoj ktp.

La plej elstara periodo de la konkurso estis sendube en la 1920aj jaroj. En tiu tempo inter la gajnintoj de la ĉefpremio, la Natura Floro, oni trovas tiel elstarajn nomojn kiel tiujn de Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay —kiuj, cetere, ne venkis en sia unua partopreno, sed ricevis minorajn premiojn en antaŭaj jaroj. La ĵurio havis ankaŭ elstarajn alilandajn anojn, kiel Émile Grosjan-Maupin, kiu prezidis ĝin en 1923. Pri la internacieco de la partoprenantaro atestas ekz. ke la premiitoj de la jaro 1927 estis el 13 malsamaj ŝtatoj

El dekoj da ĉiujaraj premiitoj dum la 17 okazoj, en kiuj la Floraj Ludoj estis organizitaj de la Kataluna Esperantista Federacio estas malfacile starigi liston de elstaraj premiitoj, kiu ne fariĝos tede longa. Ni menciigu nur kelkajn en alfabeto: Julio Baghy, Imre Baranyai (Emba), Norbert Barthelmess, Clarence Bicknell, Leo Belmont, Jaume Grau Casas, Teo Jung, Kálmán Kalocsay, Salomon Grenkamp-Kornfeld, Ivan Krestanov, Nikolao Kurzens, Heinrich August Luyken, Bruno Migliorini, Nikolao Nekrasov, Petro Stojan, Jakob Šapiro kaj Ivan Ŝirjaev.

Estis premiitaj ankaŭ tradukoj el la kataluna lingvo, kaj en du okazoj, en la 1910aj jaroj, ili atingis la Naturan Floron. La traduk-laboro de la katalunaj esperantistoj, kaj ĉe-kape de Jaume Grau Casas, spronita de la internaciaj Floraj Ludoj permesis la eldonon en 1925 de la 400-paĝa *Kataluna Antologio*. Pri ĝia graveco atestas Geof-frey Sutton en sia anglalingva verko *Konciza enciklopedio de la originala literaturo de esperanto*: “La abundo de la filologiaj notoj, la erudicia enkonduko, la prezento, la diverseco kaj amplekso, kaj ĉefe la literatura valoro de la tradukoj establis la nivelon, per kiu oni komparis ĉiun postan antologion”.

Bedaŭrinde en la 25-jara vivo de la antaŭmilitaj Internaciaj Floraj Ludoj ili suferis la homan malammon, kiu fine malaperigis ilin: unue pro la unua mondmilito, kiu ne rekte tuŝis Katalunon, sed transdonis tian pesimisman etoson, ke la tuta movado vegetis malgraŭ ĝia antaŭa impona forto. Poste, fine de la 1920aj jaroj, kiam surbaze de denunco de homoj sin konsiderantaj neŭtralaj esperantistoj al la aŭtoritatoj kontraŭ la kataluneca karaktero

de la aktivado de la Kataluna Esperantista Federacio rezultis ĝia malapero kaj la fino de la plej brila etapo de la Internaciaj Floraj Ludoj. Kaj denove, post la reveno de la libereco kaj demokratio dum la 1930aj jaroj dum la Dua hispana respubliko denove armea puĉo puŝis la landon al tri-jara terura milito kaj 40-jara militista diktaturo, kiu plene malaperigis dum longaj jaroj ĉia spuro de esperanta kaj kataluna kulturo —kaj praktike, de ia ajna kulturo—, kaj sekve silentigis dum jardekoj la Internaciajn Florajn Ludojn.

### 3. La unuaj internaciaj Floraj Ludoj en Barcelono

Post ĉi tiu historia trarigardo kaj kronologiaj donitaĵoj, ni povas reveni al la unuaj Floraj Ludoj kiuj, kiel menciite, okazis antaŭ cent jaroj, dum la 5a Universala Kongreso en Barcelono. Indas rememorigi kelkajn interesajn detalojn.

Tiujare estis 275 konkursaĵoj, por 42 diversaj konkursoj (estis eĉ pli da konkursoj, sed por kelkaj ne estis aljuĝitaj premioj), kaj la premiojn patronis multnombraj institucioj esperantistaj kaj ne-esperantistaj. Inter ili ni citu: “Iliaj majestaj moŝtoj la gereĝoj de Hispanujo”, la Rektoro de la Barcelona universitato, la Barcelona provinca deputitaro, la ministro pri enlandaj aferoj, iuj unuopaj esperantistaj grupoj, pluraj esperantistaj revuoj.

La juĝantaro konsistis el 45 spertuloj, sub prezidado de Boirac (ĝenerala), Grabowski (por poezio) kaj Kabe (por prozo). Ĉiu konkurso estis juĝita de tri ĵurianoj, dum preskaŭ la tuta jaro antaŭ la tempolimo *La Revuo* raportis pri la alvenantaj konkursaĵoj kaj patronataj premioj.

Inter la laŭreatoj de la unuaj internaciaj Floraj Ludoj elstaras la menciita Marie Hankel, el Dresdeno, kiu gajnis la unuan premion en la kategorio de ampoemoj per sia verko *Simbolo de l' amo*; la dudek-jara Edmond Privat, kiu gajnis la duan premion en la sama branĉo per la verko *Sur vojo de l' vivo*; kaj Clarence Bicknell, kiu ricevis la unuan premion en la kategorio de poemoj pri fido, per la poeziaĵo *La nova mondo*.

Aliaj menciindaj premioj estis monografio pri hispana pentristo (kiun gajnis Dufeu-trel); la taŭgeco de la esperantistaj kongresoj por la disvastigado de la interna ideo de esperanto (van Schoor); leviganta suno kaj verda stelo (Bicknell); originala fabelo (Bulthuis); loka regiona legendo (Rigoir) ktp.

Rimarkindas ankaŭ la premio, kiun ricevis la dekseks-jara Carles Riba, kiu poste fariĝis unu el la plej gravaj katalunaj poetoj de la 20a jarcento. Li atingis premion per poemo kun la titolo “Nun” kies devizo estis “Ni fosu nian sulkon”.

La 42 premioj estis disdonitaj dum granda festo. La ceremonio okazis la 8an de septembro, je la 4a horo, en la gotika salono de la Borso de Barcelono, kun ĉeesto de Zamenhof. Paroladojn faris Carlo Bourlet (redaktoro de *La Revuo*), Antoni Grabowski kaj Kabe.

La poeziajn versojn deklamis, interalie, Privat kaj Bicknell. Parto de la premiitaj konkursaĵoj estis poste presataj dum la jaro en pluraj numeroj de *La Revuo*.

Jen priskribo de la solenaĵo, laŭ unu el la tiutempaj raportoj:

La granda salono, kiu estis plenplena, prezentis imponan aspekton: belegaj tapiŝoj arte teksitaj ornamis la murojn, meze de la salono trono atendis la Reĝinon [de la poezio]; la urba muzikistaro, kiu ludis marŝon kiam eniris la Majstro, subite silentis, kaj la Urbestro protokole malfermis la feston. Sinjoro Bourlet faris belegan paroladon, plurfoje interrompitan de fortaj aplaŭdoj, kaj post ĝi sinjoro Boirac, sekretario de la Ludoj, legis la premiitajn verkojn. Trafis la bukedon de “Naturaj Floroj” sinjorino el Dresdeno Maria Hankel [...]. Kiam sinjoro Rektoro Boirac legis ŝian nomon, deliran ovacion dediĉis al ŝi la tuta ĉeestantaro stare. Li donis al ŝi sian brakon, dum la urba muzikistaro ludis triumfan marŝon: kvar urbo-gardistoj parad-ceremonie vestitaj iris post la paro, kaj sinjorino Maria Hankel okupis la tronon situantan en videbla loko de la salono. En tute impreso silento, la Sekretario Chavet legis la poemon [...]. Poste, sinjoro Grabowski legis sian belegan paroladon [...]. Post la parolado de sinjoro Grabowski, la Sekretario Doktoro Artigues legis la spritan saluton de doktoro Bein. Ambaŭ ricevis fervorajn aklamojn. Doktoro Artigues, kun sia eleganta klara parolo, legis la liston de premiitoj, kaj ĉiu siavice venis saluti la Reĝinon kaj kun riverenco ricevis de ŝia mano la premion.

Tia estis la etoso de la solenaĵo antaŭ jarcento, kvin jarojn antaŭ la Granda Milito. □

## EN SOMERAJ UNIVERSITATOJ

Delonge tio ne okazis: esperanto revenis al katalunaj someraj universitatoj. Kaj eĉ duoble: en Palma kaj en Prada de Conflent. Krome, en ambaŭ okazoj kaj verŝajne por la unua fojo ĉe ni, ne temis preskaŭ sole pri lingvokurso, sed pri multe pli. De la 9a ĝis la 15a de julio, doktoroj Gabriel Bibiloni, Lluís de Yzaguirre, Xavier Margais kaj María José Álvarez Faedo prezentis multflankan enkondukon al planlingvoj kaj tre aparte al esperanto en Majoroko (legu ĉi-apude katalunlingvan raporton). Aliflanke de la 20a ĝis la 25a de aŭgusto en Nord-Katalunio doktoroj Lluís de Yzaguirre kaj Nicolau Dols prelegis ankaŭ pri planlingvoj kun speciala atento al esperanto, klingono kaj toki-pono sub la luda demandtitolo “Ĉu ni inventu lingvon? Enkonduko al artefaritaj lingvoj”.

## EN ESCOLA EINA

Fama grafikisto kaj instruisto de la barcelona universitata faklernejo Escola Eina, Martí Ferré, petis prezenton pri esperanto. Konscia, ke grafikismo devas utili ne nur al grandaj entreprenoj, sed ankaŭ al popolaj grupoj, li proponis al siaj lernantoj grafikan laboron rilate al esperanto-movado, kaj tial ni devis prezenti esperanton al ili, por ke ili sciu, pri kio ili laboros.

Tion faris Anna Raventós, Guillem Sevilla kaj Ferriol Macip en februaro. En la unua parto de la prezento oni faris rapidan lecionon pri la funkciado de la lingvo, kaj lernejoj rapidege kapablis konstrui vortojn per kunmetado kaj aldonado de afiksoj. Oni parolis pri la historio de la movado kaj prezentis la principaron de Ka-



Martí Ferré prezentas kreaĵon de unu el siaj lernantoj pri grafikado

## LES LLENGÜES INTERNACIONALS: INTRODUCCIÓ A L'ESPERANTO

Les dies 9, 10, 13, 14 i 15 del juliol passat va tenir lloc el curs *Les llengües internacionals: Introducció a l'esperanto*, dins el marc dels cursos d'estiu que organitza cada any la Universitat de les Illes Balears i que enguany estaven relacionats amb el tema de la globalització. Cada dia, de les quatre a les vuit de l'horabaixa, en un ambient fresc i relaxat, 41 participants assistirem a les classes que tengueren lloc a Palma, a l'edifici anomenat Sa Riera.

El primer dia, el Dr. Gabriel Bibiloni ens va parlar de “La diversitat lingüística d'Europa i del món”. Amb l'ajuda de la projecció de molts de mapes vàrem conèixer com sorgiren les llengües que actualment hi ha a Europa, des de la invasió dels pobles indoeuropeus devers 4000 anys abans de Crist fins a la situació actual de multilingüisme. Aquest multilingüisme, que és proclamat per la UE com una gran riquesa i és defensat amb zel pels estats membres enfront del domini de l'anglès, no tracta per igual les llengües sense estat, com el català. En realitat, de portes endins, els estats s'han esforçat molt per eliminar les altres llengües del seu territori en favor del que anomenen la “llengua nacional”. Va parlar del grec, del llatí, de l'eslavònic eclesiàstic, de l'àrab, del xinès, del francès, de l'anglès, del suahili, del sabir i del basic english com a llengües franques o d'intercomunicació. Però com

que la majoria d'aquestes han estat associades al poder econòmic i polític, la creació de l'esperanto com a llengua auxiliar internacional creu que és un fet molt positiu perquè es basa en dos principis: el principi de la facilitat i el principi de la democràcia, el qual fa possible relacions d'igualtat.

També el dia 9, i part del dia 10, el Dr. Lluís de Yzaguirre va fer una introducció a les llengües artificials i va parlar de la recerca d'una llengua neutral per part de molts de lingüistes, de científics i de pensadors al llarg dels darrers segles. Creu que no es pot oposar “llengua natural” a “llengua artificial” perquè en realitat el que hi ha és una gradació en el nivell d'intervenció deliberada. En canvi, ell pensa que cal parlar de llengües *advencies*, aquelles que sorgeixen d'un poble, i de llengües *factícies*, les de laboratori, les construïdes. Després de parlar d'algunes llengües factícies –toki pona, loglan, novial, newspeak, volapük, esperanto, ido, etc.– es va mostrar convençut que l'esperanto és una de les millors solucions, des del punt de vista tècnic, per a la intercomunicació internacional. Va usar l'ordinador per a il·lustrar el que deia i per a convidar els participants a ampliar coneixements mitjançant Internet.

El Dr. Xavier Margais va parlar de la història de l'esperanto i, especialment, del

moviment esperantista a les Illes Balears. Després de fer-nos conèixer la figura de Zamenhof i les seves motivacions per a la creació de l'esperanto, va explicar l'evolució del moviment esperantista relacionant-lo amb els moviments socials i els fets històrics del final del segle XIX i principi del segle XX. La seva conferència va anar acompanyada de la projecció d'una presentació en ordinador amb moltes fotografies interessants, moltes de les quals relacionades amb els congressos de l'Associació Catalana d'Esperanto que es feren a Mallorca els anys 1925 (Palma), 1927 (Sóller), 1993 (Alcúdia) i 2004 (Sóller).

Finalment, els dies 13, 14 i 15, la Dra. María José Álvarez Faedo va fer el curs Enkonduko al Esperanto, de dotze hores de duració, el qual va assolir plenament l'objectiu d'explicar i practicar la gramàtica de l'esperanto. Vàrem treballar per parelles i veiem alguns episodis de Muzzy molt simpàtics, però personalment vaig trobar a faltar més ús de l'esperanto en totes les situacions, especialment les que possibilitaven una comunicació real. Es va proposar fer una trobada de la gent del curs que volgués practicar l'esperanto durant la tardor.

Assumpta Mascaró





Kelkaj kreaĵoj de la lernantoj de Escola Eina



Esperantistoj ne nur varbis en budo dum la nacia tago, sed kelkaj ankaŭ aliĝis al surstrata manifestacio

kurso en somera universitato ekde la venonta jaro.

Fakte, kiel ĉiujare, restartis la kurso de esperanto en Prada komence de aŭtuno, kun la aliĝo de plia ano al la ĝisnuna ses-kapa rondo.

## SURSTRATA VARBADO

Kiel en la pasintaj sep jaroj, KEA partoprenis per propra budo en la 8a Foiro de Asocioj de la Katalunaj Landoj, kiu okazis surstrate ĉe la trium-arko de Barcelono la pasintan 11an de septembro dum la tuta tago, okaze de la nacia tago de Katalunio. Defendo de lingvaj rajtoj kaj diverseco kaptis la atenton de preterpasantoj, disvendado de libroj pri lingvaj rajtoj, pri esperanto kaj en esperanto estis rekorda kompare al aliaj okazoj. Informpetado pri kursoj de esperanto estis aparte sukcesa, fakto, kiu kontribuis al starigo de pliaj kursoj en Barcelono.

taluna Esperanto-Asocio. Post debateto, kie lernejoj multe partoprenis, rilate al principaro de KEA, Guillem Sevilla lekciis pri esperanto-tipografioj, ĉefe pri ĉapelitaj literoj, kaj prezentis la grafikojn kaj simbolaron de esperanto-movado laŭlonge de ĝia historio.

De tiam, lernantoj ekprilaboris siajn kreaĵojn: afiŝojn, la revuon *Esperanto*, identigilojn, KD-ujojn kaj flugfoliojn enhavantajn gramatike-ton kaj vortaron. La 5an de julio lernejoj prezentis siajn laborojn. La 19an de julio la samaj tri KEA-aktivuloj reiris en la universitatan faklernejon por vidi la laboraĵojn. Kelkaj rezultoj estis mirindaj, kaj oni kontaktis kelkajn el la ĵusdiplomitaj grafikistoj por eldoni iun kreaĵon.

Ferriol Macip i Bonet

## AKTIVAS PRADA

La esperanto-grupo de Prada de Conflent aperigis tri-kolumnan artikolon en la ĵurnalo *L'Indépendent* la 14an de julio. En ĝi la aktivuloj prezentas sian faritan taskon pri la diskonigo de la regiono kaj ties kultura heredaĵo, kaj aparte pri la pasintjara laboro super kolekto de biografioj pri lokaj esperanto-pioniroj.

Ankaŭ la 6an de septembro aperis kvar-kolumna artikolo de Christian Pinard en la sama ĵurnalo pri la ĵusa kurso pri planlingvoj en la somera universitato de Prada kaj pri kunveno de katalunaj esperantistoj el ambaŭ flankoj de Pireneoj en tiu okazo, kie ili planis novajn komunajn agadojn, i.a. la starigon de esperanto-

## ESPERANTO EN LERNEJO

Elisabet Abeyà komencis libervolan kurson de esperanto en sia elementa lernejo en Bunyola (Majorko). Partoprenas 14 lernantoj de la du lastaj kursoj (10- kaj 11-jaruloj). Temas pri unu horo en la semajno, kiam aliaj faras judon, muzikon k.s. Estas uzata la libro *Ludu kun ni*, kaj krome oni kantas, ludas, rigardas filmojn, festas la naskiĝtagon ktp.

ea / red

## NOVA RETEJO EN MANRESA

La Grupo de Esperanto Manresa aperigis komence de oktobro novan retejon ĉe [www.esperanto.cat/manresa](http://www.esperanto.cat/manresa). Ĝi celas informi la publikon pri la esperanto-aktivaĵoj en Manresa kaj kontribui al la videbligo de la geografia disvastigiteco de la kataluna esperantismo.

Laŭ siaj iniciatintoj, la projekto ankoraŭ staras en komenca fazo. Oni antaŭvidas aldoni prezenton de Manresa en la internacia lingvo kaj kompletigi la fakon pri historio de la esperanto-movado en la urbo.

Comunicacions Bages-Esperanto / red

## CENTJARIĜO DE LA BARCELONA UK EN VILANOVA

Joan Inglada publikigis du-paĝan artikolon en la semajna gazeto *Diari de Vilanova* de la 25a de septembro titolitan "1909, Vilanova i



el 5è Congrès Internaciŝon d'Esperantistoj". En ĝi, okaze de la centjariĝo de la Universala Kongreso en Barcelono, la eksprezidanto de KEA prezentas trarigardon de la sinteno de la tiama kataluna socio pri esperanto kaj de la partopreno de vilanovaj esperantistoj en la kongreso.

## PRI ESPERANTO EN LA RETO

La retejo *altresbarcelones.com* fare de la historiisto kaj esperantisto Dani Cortijo publikigis la artikolon pri la 5a Universala Kongreso en Barcelono la 5an de septembro, ĝuste cent jarojn post ĝia inaŭguro. La retejo, kiu jam januare publikigis artikolon pri Joan Amades kun speciala emfazo pri lia esperantisteco, diskonigas por la ĝenerala publiko nefamajn aspektojn de la historio de Barcelono. Ĝia elstara nivelo kaj intereso igis ĝin ricevi la pasintan 2an de oktobro la premion "Bloc Catalunya 2009" en la kategorio "kulturo" al la plej bona kataluna kultura blogo.

## EN KARKASUNO, POR LA OKCITANA LINGVO

25 000 personoj laŭ organizantoj, 18 000 laŭ la polico, manifestaciis en la okcitana urbo Karkasuno por la okcitana lingvo. Kvar jarojn post la unua manifestacio, la ĉi-jara mesaĝo estis pli firma "nia pacienco elĉerpigis, ni volas agnoskon ne nur simbolan, sed veran", asertis David Grosclaude, prezidanto de la Instituto pri Okcitanaj Studoj, kiu aldonis "ni ne plu petu, sed faru la necesan premon ĝis la atingo de la agnosko". Organizis la manifestacion aro da societoj, kiuj sukcesis kunigi asociojn, partiojn kaj unuopulojn el ĉiuj regionoj de Okcitanio, el hispania Valo Aran ĝis la italiaj okcitanaj valoj. Elstaris la ĉeesto de kelkaj dekoj da politikistoj kiaj i.a. Francés Boya, prezidanto de Valo Aran; José Bové, eŭrodeputito; Jean Charles Valladier, vicurbestro de Tuluzo. Kunmarŝis ankaŭ reprezentantoj de aliaj minorigitaj popoloj, kiaj arpitanoj, venetoj kaj katalunoj. Akompanis la okcitanajn esperantistojn delegacio de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu marŝis malantaŭ tol-afiŝo, kie legeblis la devizo "occitan lenga nacionala, esperanto internaciŝonala" ["okcitana nacia lingvo, esperanto internaciŝonala"].

Oni ĝuis festan etoson antaŭ kaj post la manifestacio. Matene okazis foiro en la ĝardenoj André Chenier, kie diversaj anaroj montris kaj disvendis siajn aferojn. Okcitanaj esperantistoj starigis budon, en kiu nia asocio kunlaboris per pretigo de flugfolioj. Post la manifestacio, la sama ĝardeno gastigis imponajn koncertojn pri



GUILLEM SEVILLA

*En Karkasuno, por la okcitana lingvo*

okcitana muziko. La plej festemaj daŭrigis en tuj posta festivalo en apuda urbo Vilagalhenc.

Ferriol Macip i Bonet

## BIBLIOTEKO MEMORIGAS LA INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN

Dum la dua duono de oktobro, okaze de la cent-jara datreveno de la Internaciaj Floraj Ludoj, biblioteko Pare Miquel de Esplugues de Llobregat aranĝis ekspozicion pri la jubileo, sub la titolo "Kvin Floraj Ludoj en Esplugues. Cent jaroj de la unuaj Floraj Ludoj en esperanto". La ekspozicion prizorgis la bibliotekestro kaj historiisto de la kataluna esperanto-movado Narcís Fluvià.

## LIBROPREZENTO EN LA NACIA HISTORI-MUZEO

La pasintan 12an de novembro en salono de la Muzeo pri Historio de Katalunio okazis prezento de la libro *El Congrès Universal d'Esperanto de 1909 a Barcelona*, verkita de Francesc Poblet i Feijoo. Ĝi estas dulingva kaj la esperanta versio –*La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono*– ŝuldiĝas al Raúl Salinas Monteagudo.

La direktoro de la Muzeo, Josep M. Roig Roŝich forestis pro profesia vojaĝo kaj sendis senkulpigon.

***La Estro de Lingva Politiko de la Kataluna Registaro, Bernat Joan, emfazis la gravegan rolon de esperantistoj kiel subtenantoj de universalaj kaj pozitivaj valoroj kaj kiel firma bazo, sur kiu sociaj ŝanĝoj estas nepre sukcesontaj***



DAVID GARCIA FALCÓ

Unue parolis Llibert Puig, KEA-prezidanto, kiu kun respondeca sento skizis la historion de la instruado de ununuraj universalaj lingvoj en Katalunio. Oni povus pensi –asertis s-ro Puig–, ke la angla havas la saman influon kiel la franca antaŭ ekzemple kvindek jaroj aŭ pli. Ĉi tiu konsidero nepre kuŝas sur la fakto, ke oni malatentas la efikon de la modernaj komunikiloj, kiuj plej vaste kaj insiste ĉiam propagandas la saman, difinitan lingvon. Tial, la aktuala disvastigo de la angla ja povas plej rapide rezultigi la pereon de la ceteraj lingvoj.

Poste, Ferriol Macip, KEA-sekretario, donis la parolon al la historiisto kaj verkisto de la prezentata libro, Francesc Poblet, kiu tre realece priskribis la historian medion, en kiu okazis la 5a Universala Kongreso. Ĝuste antaŭe eksploro

Libroprezento en la nacia histori-muzeo

## COMMEMORACIÓ A LA REIAL ACADÈMIA DE MEDICINA DE CATALUNYA

**E**l proppasat 15 de desembre ha tingut lloc una solemne celebració organizada conjuntament per la Reial Acadèmia de Medicina de Catalunya i l'Associació Catalana d'Esperanto. Es tractava de commemorar el 150è aniversari del naixement del Dr. L. L. Zamenhof, iniciador de la llengua esperanto. Les entitats organitzadores testimoniaven així la doble condició de metge oculista i d'esperantista de l'homenatjat.

L'acte fou presidit pels respectius presidents, que van adreçar unes paraules de salutació i benvinguda als assistents: socis de les entitats organitzadores, parents d'un altre homenatjat, com es dirà més avall, i periodistes. La sessió es tingué a la seu de la Reial Acadèmia, edifici històric que hostatjà les classes i les investigacions del Dr. Santiago Ramón y Cajal, futur premi Nobel de Medicina, en el moment que residia allí la facultat corresponent. Abans de començar les intervencions, el president de l'Associació Catalana d'Esperanto llegí en català un missatge de salutació enviat pel doctor Imre Ferenczy, president de l'Associació Universal de Metges Esperantistes.

Les cinc ponències que integraven la celebració miraven cap al passat i cap al futur, mentre que el present estava esde-

venint en aquell mateix moment. El Dr. Manuel Escudé va parlar del Dr. Zamenhof posant èmfasi en la seva condició de metge i en la seva humanitat, com ho testimonia l'anècdota de quan va acceptar de visitar un malalt durant la seva estada a València. Lluís de Yzaguirre i Maura, doctor en Filologia catalana i director del Laboratori de Tecnologies Lingüístiques (IULA-UPF), va parlar de l'esperanto en el tercer mil·lenni. Va dir que, així com l'aparició de la impremta va marcar una diferència entre les llengües que van començar a treure'n profit i les que només es van mantenir en la tradició oral, així també l'aparició d'Internet establirà un nou punt d'inflexió. A la xarxa ha aparegut un cert nombre d'eines utilitàries fonamentades en les modernes tecnologies lingüístiques, eines que només estan disponibles, en tot o en part, per a un cert nombre de llengües i no per a les altres. El Dr. Yzaguirre va mostrar amb dades estadístiques que l'esperanto es troba dintre del grup de llengües que disposen d'aquestes dades (encara que no totes) i té, per tant, una bona base per a continuar progressant durant el segle en què ara entrem.

La tercera intervenció va anar a càrrec de l'historiador Francesc Poblet, que va parlar del V Congrés Universal d'Esperanto que tingué lloc a Barcelona l'any

1909, ara fa justament cent anys. El ponent va parlar dels aspectes socials més rellevants de la celebració del congrés, emmarcats en les cites de la presència de la idea de llengua universal en els temps anteriors de la societat catalana i de la presència de l'esperanto en els anys previs al congrés, i va acabar amb una breu relació de l'evolució del moviment esperantista en els anys posteriors. Seguidament, el Dr. Corbella, en la seva condició d'acadèmic numerari, va parlar de l'obra del Dr. Jacint Bremon com a metge i esperantista. Com a metge, fou pioner de les aplicacions de la radiologia a la medicina. Com a esperantista, destaca pels seus articles mèdics en esperanto i per la seva *Gramàtica y vocabulario de la lengua internacional esperanto*, que l'any 1971 ja havia arribat a la cinquena edició. Una néta del Dr. Bremon, simpatitzant de les idees del seu avi, era present a la sala. Finalment, el Dr. Ferran Sabaté va dissertar sobre la presència de l'esperanto en les publicacions de la medicina catalana, fet que s'esdevení singularment en els anys posteriors al congrés mencionat, durant els quals apareixien articles científics en esperanto. Cal destacar que fou el Dr. Sabaté qui proposà primerament la idea d'aquest acte a les entitats coorganitzadores.

Ramon Riera

dis popola ribelo en Barcelono kontraŭ la reganta klaso pro perforta armea rekrutado, do la Kongreso estis markita de tiu preskaŭa koincido. El lia parolo, legemo okupis ĉiujn mensojn.

Fine, parolis la Estro de Lingva Politiko de la Kataluna Registaro kaj aŭtoro de la enkonduko, Bernat Joan. Elmontrante nemagran konon de la historio de esperanto, li emfazis la gravegan rolon de esperantistoj kiel subtenantoj de universalaj kaj pozitivaj valoroj kaj kiel firma bazo, sur kiu sociaj ŝanĝoj estas nepre sukcesontaj.

Ramon Riera

## JUBILEA SOLENAĴO ĈE LA MEDICINA AKADEMIO

La 15an de decembro la Reĝa Akademio de Medicino de Katalunio kaj Kataluna Esperanto-Asocio kunorganizis kunvenon por solene festi la 150an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof. Prelegis kvin membroj kaj de la Reĝa Akademio kaj de KEA. La kerno de la festo baziĝis sur la duobla karaktero de D-ro Zamenhof kiel okulkuracisto kaj kiel iniciatinto de esperanto. [Legu ĉi-apude pli ampleksan katalunlingvan raporton.]

rp

## FESTA ZAMENHOF-MANĜO

La pasintan 13an de decembro, 26 personoj inter 3 kaj 90 jaroj kuniĝis en sabadella restoracio por digne festi la 150an naskiĝdatrevenon de nia esperanto-patro. La ĉi-jare elektita loko estis la restoracio “El Ciervo”, historia kultura kaj sporta centro de la sabadella kvartalo de Gràcia. Kaj ni ĝoje konstatis, ke tradicia estis ankaŭ la tiea kuirarto, kiu per libera bufedo, regalas kaj satigas nin per tipaj bonvenaj vintraj fortikaj katalunaj pladoj (sovaĝa salato, marfruktaj vermiceloj, anaso, viandosupo, viandobuletoj, bovidaĵoj kun fungoj ktp. ne estu manĝataj per la okuloj, diable, ĉefe se frostegas ekstere!). Internacian kaj malkrokodiligan tuŝon feliĉe alportis Marcin, juna Erasmusa studento el Varsovio, kiu rapidege sabadellumis kaj kataluniĝis, i.a. danke al partopreno en homtura grupo el Bellaterra, kaj Yutaro, juna japano jam enamiĝinta al nia lando de kelkaj jaroj kaj konata de kelkaj el niaj membroj pro ilia partopreno al la 2007a UK en Jokohamo. Sed la “ora najlo” de la tagmanĝo sendube estis spektaklo de la ejestro Carles Reiet, humoristo kaj magiisto, kiu ravis kaj forte impresis nin per siaj magiaj kaj menskomunikaj lertaĵoj, tiel metante finan distregan punkton al bonega kuna momento.

Éric Collignon



ERIC COLLIGNON KAJ SILVIA SIMÓ

Bonegan kunan momenton pasigis sabadellanoj okazde de la Zamenhof-tago

## TRIOBLE PRI ESPERANTO EN TELENOVAĴOJ... KAJ NE NUR!

La 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estis diversloke atentigita. Eble plej elstare pro sia tutmonda eĥo, la ret-serĉilo Google aperigis esperanto-flagon la 15an de decembro en la plimulto de siaj eldonoj (kvankam ne en la kataluna).

En Katalunio TV3 dediĉis sian atenton al esperanto en tri malsamaj novaĵbultenoj. Dimanĉon la 13an de decembro la tagmezaj novaĵoj en sia interreta rubriko prezentis la vivantecon de esperanto en la reto. Oni subtrekis la esperantlingvan Vikipedion kiel unu el la plej grandaj eldonoj de tiu reta enciklopedio. Oni atentigis ankaŭ pri la retejo de KEA, aparte pri la lerniloj en ĝi kaj ĝia televida informilo KIS TV. Du tagojn poste kaj la tagmezaj kaj la vesperaj novaĵoj denove dediĉis sian atenton al esperanto. Ĉi-foje la informoj centriĝis pri la muzeo de esperanto en Sant Pau d'Ordal kaj en ĝi esperanto implicate aperis kiel simpatia iniciato, sed malnoviĝinta.

Samtage ankaŭ la programo “Celobert” de la elsendejo Ràdio 4 intervjuis Ramon Perera, dum Com Ràdio intervjuis Ferriol Macip, kaj la vespera programo “El crepuscle encén estels” de IB3 Ràdio pritraktis la okazaĵon. La ret-ĵurnalo *Vilaweb* aperigis belan artikolon titolitan “Feliĉan esperanto-tagon” (kun titolo originale en esperanto) kun multaj ligoj al esperantaĵoj. Tiu ĉi novaĵo ŝajne inspiris porresperantan blogaĵon de la verkisto Biel Majoral aperintan en la sama tago (por citi nur unu el la personaj retnotoj dediĉitaj al tiu temo).

Lige kun la tago, la barcelona eldonejo Alpha Decay publikigis novelon de Ferenc Szilágyi en dulingva eldono en esperanto kaj en his-

**TV3 dediĉis sian atenton al esperanto en tri malsamaj novaĵbultenoj. Ankaŭ pritraktis la okazaĵon Ràdio 4, Com Ràdio, IB3 Ràdio, kaj Vilaweb. Konsekvence aperis artikoloj en La Vanguardia, El País, El Mundo kaj Diario Médico**



**Ĉi-jare oni memorigis  
ankaŭ la 50-jariĝon  
de la morto  
de Joan Amades,  
pro kio diversaj  
gazetoj aperigis  
artikolojn pri li.  
Preskaŭ ĉiam  
lia esperantisteco  
estis atentigita**

pana traduko sub la titolo “La liberación del juez”. La novaĵo estis dissendita de la agentejo Europa Press kaj kelkaj gazetoj eĥis. Plej atentinde, *La Vanguardia* de la 15a de decembro publikigis intervjuon kun la tradukinto, Javier Guerrero. Bedaŭrinde en ĝi aperas multaj ŝablonaj kaj malĝustaj asertoj, kvankam certe la ĝenerala impresio estas pozitiva. Pli mallonge, la katalunia kultura suplemento *Tendències* de la ĵurnalo *El Mundo* aperigis la 17an de decembro kolumnon pri la libro.

Klaraj konsekvencoj de ĉio ĉi estis la artikoloj aperintaj en *La Vanguardia* la 21an de decembro kaj en la katalunia eldono de *El País* la 28an de decembro. En *La Vanguardia*, sub la titolo “Felicxan Kristnaskon” (tiele en la originalo), la ĵurnalista Magí Camps favore prezentas esperanton kiel facilan lingvon tre ligitan en la pasinto kaj hodiaŭ al Katalunio. En *El País* la ĵurnalista Xavier Theros taksas, en longa favora artikolo, ke “esperanto daŭre fartas bone, dankon” (“El esperanto sigue bien, dankon”, titolo de frontpaĝa kolumnero anoncanta la postan duonpaĝan artikolon titolitan “El esperanto y Babel”). La artikolo, kiu entenas plurajn flankajn malĝustaĵojn, elstarigas la potencon de esperanto en la reto, kiun ĝi taksas nemalhavebla por vivoviglo en la hodiaŭa mondo. Elstarindas, ke kiel ĵusaj precedentoj pri la vogleco de esperanto la artikolo citas tri aferojn: la flagon en Guglo, la organizon de omaĝo al Zamenhof fare de la Reĝa Akademio de Medicino de Barcelono, kaj la dulingvan eldonon, en la esperanto-originalo kaj en hispanlingva traduko, de novelo de Szilágyi fare de barcelona eldonejo.

Siavice *Diario Médico* raportis tutpaĝe pri la solena aranĝo de la Reĝa Akademio de Medicino en sia eldono de la 29a de decembro.

Tamen la datreveno de Zamenhof ne estis la sola elstara kialo por mencii esperanton en nia gazetaro. Ĉi-jare oni memorigis ankaŭ la 50-jariĝon de la morto de Joan Amades, pro kio diversaj gazetoj aperigis artikolojn pri li. Preskaŭ ĉiam lia esperantisteco estis atentigita.

jg / fm / rp / vs / ji / red

## SKA KUN ESPERANTA POŝTKARTO

La ensemblo “El Belda i el conjunt Badabado” lanĉis en majo diskon, kie ĝi versias laŭ ska-ritmoj popolajn katalunajn kantojn. La KD enhavas kvin poŝtkartojn alloge priskribantajn Katalunio kaj la kantojn de la disko. La poŝtkartoj estas en la kataluna, angla, germana, amaziga kaj esperanto. Post la tuja elĉerpiĝo de la unua eldono de la disko, la esperanta poŝtkarto aperas ene de la dua eldono.

La pritrakto de esperanto en tiu ĉi albumo estas alloga propagandilo, kaj la distribuo estos multnombra.

fm / red

## LA AŬTOMATAJ TRADUKILOJ PROGRESAS

Komence de julio aperis nova versio de la aŭtomata tradukilo el la kataluna al esperanto kaj fine de novembro aperis nova versio de tiu el la hispana, ambaŭ evoluigataj de Hektor Alos. La novaj versioj, uzablaj ĉe la ret-adresoj [www.apertium.org](http://www.apertium.org) kaj [www.traduku.net](http://www.traduku.net), aldonis novajn vortojn, korektis ekzistintajn mistradukojn kaj ĉefe prifajnigis traduk-regulojn, tiel ke la esperantigo nun aperas pli natura ol antaŭe. Temas ĉiuokaze pri kruda traduko, kiu tamen permesas kompreni la originalan tekston al nesciantoj de la kataluna aŭ hispana fontolingvo (kvankam foje unuopaj frazoj plu estas malbonege redonataj), kaj povas utili kiel helpilo al tradukantoj de nebeletraj tekstoj al esperanto.

Tiucele, la tradukiloj surbaze de la liberprogramara platformo Apertium progresadas. La platformo ricevis stipendiojn de la firmao Google, kiuj permesis ĉi-somere evoluigi novajn eblojn kaj lingvoparojn. Specife pri la Apertium-bazitaj esperanto-tradukiloj, pionire kreitaj de teamo de la universitato Pompeu Fabra de Barcelono, instige de la entreprenio ABC-Pack Enciklopedioj, ĉi-aŭtune aperis ankoraŭ tre elementa tradukilo el esperanto en la anglan, evoluigata de la dana esperantisto Jacob Nordfalk. Temas pri la unua traduki-



lo el esperanto surbaze de Apertium, kio estas elstara defio. Aliflanke komenciĝis ankaŭ la disvolvo de tradukilo el la franca en esperanton, fare de Hektor Alos kaj la franca esperantisto Baptiste Darthenay, dum siaflanke la fama rusa esperanto-vikipediisto Maksim programis utilaĵojn por krei novajn artikolojn en la esperanta Vikipedio el alilingvaj vikipedioj uzante la Apertium-tradukilojn (*ftp2.image2work.dk:8080/vikitraduko*).

## NOVA KD DE KTP

Ok jarojn post “Sojle de la klara temp” kaj kvin post “Plaças al mi”, Kaj Tiel Plu daŭre proponas vojaĝon tra la muzikoj de la mezepoko kaj de la tradicioj kataluna, okcitana kaj sefarda. Krome, reaperis la originala spirito de la bando, kiu en sia komenco trinkis el internacia repertuaro, kaj proponas ankaŭ kantojn kaj dancojn el Kroatio, Kabilio, Danio kaj Anglio.

La unua disko estis pli mezepoka, la dua estis pli tradicia. “Surplacen venu vi” estas pli direktata al dancmuziko kaj montras maturiĝon de la bando, kiu prezentas kantojn kaj dancojn per tre bunta kaj riĉa muzikilaro kiel gitaro, mandolino, kontrabaso, violono, flutoj, gambovjolo, akordiono, diversaj perkutiloj, koruso kaj ĉefa melodia voĉo.

La kantoj, tradukitaj al esperanto, tute ne perdis ties originalajn lingvojn. La libreto prezentas kaj la kantatan esperantaĵon kaj la kanton en la originala lingvo (okcitana, kataluna, judhispana, kroata, amaziga kaj hispana), sed male, utilas al diskonigo de la diversaj tradicioj, kaj atingas la korojn de tre diverspeca publiko.

Kiel en la duaj antaŭaj albumoj la disko komenciĝas per mezepoka melodio kaj finiĝas per tradicia kanto de la hispana civila milito.

Tiu KD inkluzivas dek instrumentajn versiojn de la kantoj por karaokeo kaj filmeton pri la bando en la studio.

Vinilkosmo

## MEZLERNEJA LERNOLIBRO ATENTIGAS PRI ESPERANTO

La prestiĝa eldonejo de lernejaĵoj Teide aperigis novan lernolibron por la lasta jaro de mezlernejo, en kiu esperanto estas elstare reliefgita. Laŭ la kataluna mezlerneja studplano la gejunuloj devas lerni pri sociaj aspektoj de lingvo: kontakto inter lingvoj, individua kaj socia dulingvismo, diglosio, malapero de lingvoj, socia restarigo de lingvoj, lingvonor-



migado, lingvaj rajtoj k.a. Ĝuste la 22-paĝa kvina ĉapitro de la lernolibro, sub la titolo, “Lingvoj kaj socioj” prezentas tiun vastan temon kaj tiucele dediĉas la kvar unuajn paĝojn al esperanto. Ĉefrolas artikolo en la kataluna aperinta tiulingve en la frontpaĝo de *Kataluna Esperantisto* titolita “Esperanto hodiaŭ, kial?”. En ĝi oni prezentas la internacian neŭtralan lingvon kiel parton de multflanka agado por la atingo de egalaj rajtoj inter la civitanoj kaj entute por pli justa kaj paca mondo. La artikolo komparas la enkondukon de esperanto kiel dua lingvo de la homaro al la celoj de aliaj movadoj, por montri, ke ĝi ne estas pli utopia ol la egaleco de viroj kaj virinoj aŭ la starigo de mondo sen militoj, malsato, kuraceblaj malsanoj kaj kun justa distribuo de la havaĵoj. Pro tio, same kiel indas batali por realigi ilin, ne indas flankenlasi la celon de neŭtrala lingvo.

La lernolibro, kaj eĉ pli la libro de la instruisto, proponas multnombrajn laborojn pri la teksto kaj entute pri esperanto: analizon de la artikolo kun listigo de ĝia argumentaro, redaktaĵojn pri esperanto, klasan debaton pri ĝi, legadon de la artikolo en la katalunlingva Vikipedio pri kin-arto kaj esperanto k.a.

Unu el la aŭtoroj de la lernolibro estas la esperantistino Anna Maria Muñoz, mezlerneja instruistino de la kataluna lingvo, kiu jam antaŭe kunaŭtoris aliajn mezlernejaĵojn pri la katalunaj lingvoj kaj literaturo.

\* Macià, Jaume; Muñoz, Anna Maria; Gallart, Marta (2009): *Altaveu (Llengua catalana i literatura de 2n de batxillerat)*. Barcelona: Ed. Teide.

**“Surplacen venu vi” estas pli direktata al dancmuziko kaj montras maturiĝon de Kaj Tiel Plu, kiu prezentas kantojn kaj dancojn per tre bunta kaj riĉa muzikilaro**

**La lernolibro, kaj eĉ pli la libro de la instruisto, proponas multnombrajn laborojn pri la teksto kaj entute pri esperanto**



Joan Margarit

## DEKDU-LINGVA RETEJO ANKAŬ EN ESPERANTO

Ekfunkciis septembre la nova dekdulingva retejo *deulofeu.org* pri la kataluna politikisto kaj filozofo pri la historio Alexandre Deulofeu i Torres (1903–1978). Ĉefe esperantigis ĝin nia samasociano Joan Inglada.

Siavice Jordi Alcàsser tradukis al esperanto ok-paĝan broŝuron pri la ekonomia krizo verkita far la sindikato CGT de Baix Llobregat legebla ĉe [www.enxarxa.com/esperanto/CGT%20Baix%20Llobregat-Crisis%20EO-web.pdf](http://www.enxarxa.com/esperanto/CGT%20Baix%20Llobregat-Crisis%20EO-web.pdf)

ji / dr / red

## PRELEGO DE NICOLAU DOLS EN UK

Nia samasociano Nicolau Dols prelegis en la 62a sesio de la Internacia Kongresa Universitato pri “perspektivoj en fonologia kaj fonetika esplorado de esperanto”. Dudektri-paĝa artikolo aperis en la tuj posta IKU-libro, eldonita

de UEA. En ĝi Dols fake diskutas la konflikton inter lingva normo eventuale postulanta elparolon kvazaŭ egalan al la ortografio kaj natura emo al faciligo de la prononcado. Nicolau Dols estas fakulo pri fonetiko kaj fonologio, instruisto pri la kataluna kaj ĝenerala lingvistiko en la Universitato de la Balearaj Insuloj, en kiu li samtempe vicrektoras.

## DENOVE EN MONATO

De la oktobra ĝis la decembra numeroj Ferriol Macip, delonga kompostisto de ĉiuj KEA-eldonaĵoj kaj multjara plentempa profesia gazet-kompostisto, denove okupiĝis pri la grafikado de la revuo *Monato*. Li anstataŭis la nunan regulan kompostistino, Julia Litvinova, kiu patrinigis. Ferriol Macip jam kompostis *Monato* dum tri jaroj, ĝis kiam li devis forlasi la postenon pro novaj profesiaj projektoj antaŭ jaro kaj duono.

## ARTIKOLO EN SENNACIULO

Nia samasociano Joan Inglada publikigas interesan artikolon en la septembra-oktobra numero de *Sennaciulo* okaze de la centjarigo de la mortigo de Francesc Ferrer i Guàrdia. Montriĝas, ke Francesc Galceran, la verva defendanto de la pedagogo, estis frato de elstara vilanova esperantisto, kaj ke en la sama monato de la ŝajnprocezo kaj ekzekuto de Ferrer estis eldonita en Parizo esperantlingva traido de lia advokata pledo dum la procezo.

## JOAN MARGARIT EN BELETRA ALMANAKO

La kvina numero de la literatura revuego *Beletra Almanako* publikigas sep poemojn de la kataluna poeto Joan Margarit tradukitajn al esperanto de Abel Montagut, Jorge Camacho kaj Antonio Valén. Krome aperas ankaŭ lia enkonduko al lia dulingva poemaro *Estació de França*, en kiu la aŭtoro pritraktas sian rilaton al siaj du verklingvoj, la kataluna kaj la hispana.

Samnumere aperas ankaŭ preskaŭ dudekpaĝa eseo de Abel Montagut pri la lasta, nefinita, romano de Jules Verne *Voyage d'Études* [“Esplorvojaĝo”], ĝia planado, la okazaĵoj ligitaj al ĝia verkado kaj al ĝia posta kompletigo kaj transformiĝo al *Étonnante aventure de la mission Barsac* [“Miriga aventuro de la misio Barsac”] fare de lia filo Michel. La teksto estas praktike tiu antaŭe publikigita en la retgazeto *Libera Folio* en tri sinsekvaj artikoloj en decembro 2008 kaj januaro 2009.

## LLUÍS ARMADANS I MARFÀ

La 25an de septembro forpasis Lluís Armadans i Marfà. Li estis parolanto de esperanto de antaŭ multaj jaroj. Instruis la lingvon, aktivis por mondo pli justa, laboris por la naturismo kaj la vegetarismo. Verkis poezion, desegnis karikaturojn. Li akceptis postenojn en la komitato de KEA. Plej grave, li estis ekstreme humaneca, afabla kaj bonkora. Ĉiam preta helpi la aliajn, li posedis fajnan humursencon, neniam agreseman, ĉiam amikecan.



## REGRESO EN GALEGIO KAJ EŬSKIO

*Etnismo* publikigis ĉi-some unu-paĝan artikolon de Hektor Alos i Font titolitan “Regreso en Galegio kaj Eŭskio” ene de aparta inform-cirkulero sendita al la abonantoj. La artikolo analizas ŝanĝojn en la lingvopolitikoj en Galegio kaj Eŭskio en Galegio kaj Eŭskio tuj post la ekrego de respektive la Popola Partio kaj la Hispana Laborista Socialisma Partio.

## PONTO POR DIALOGO

Ferriol Macip publikigis en la novembra numero de la internacia magazino *Monato* artikolon titolitan “Ponto por dialogo” pri la referendumo por la sendependiĝo de Katalunio okazinta septembre en Arenys de Munt.

## PRI LA ĈUVAŜA KAJ LA KATALUNA

Hektor Alos partoprenis en la 14a Lingva Festivalo en Ĉuvaŝio prezentante la katalunan lingvon. Temis pri unu el la 36 lingvoj prezentataj dum du tagoj antaŭ entute milo da homoj. Rimarkinde, ne nur li prezentis la katalunan lingvon, sed ankaŭ la Moskva esperantisto kaj bonega konanto de la lingvo, Miĥail Ĥaminskij. Ĉi-jare, la Festivalo konsistis el ne malpli ol 15 diversaj aranĝoj okazintaj laŭlonge de monato kaj duono. Inter ili estis universitata konferenco pri “naciaj kaj internaciaj lingvoj”, en kiu nia samasocio prelegis pri la situacio de la ĉuvaŝa lingvo. Alia estis la traduko de ĉuvaŝa fabelo en multajn lingvojn pere de esperanto por krei libreton distribuotan tra la lernejoj. El la tradukoj el pli ol 20 lingvoj ricevitaj ĝis la komenco de novembro staras la kataluna kaj la okcitana fare de Elisabet Abeyà kaj Ferriol Macip, respektive.

## DU NOVAJ HEREDAĴOJ

Eniris la KEA-arkivon du novaj heredaĵoj: tiuj de pastro Claramunt (fare de lia frato) kaj tiuj de Josep Alberich (fare de lia filo Jordi). La biblioteko-arkivo de KEA estis fondita surbaze de la granda librokolekto de Pere Nuez kaj de tiam regule pligrandiĝas, precipe sed ne nur, danke al heredaĵoj.

## OMAĜO EN CASTELLDEFELS

La pasintan 26an de junio la magistrato de Castelldefels organizis omaĝon al la elstara politika aktivulo kaj esperantisto Ramon Fernández Jurado. Fernández Jurado (1914–1984) aktivis

en Bloc Obrero i Camperol kaj poste en POUM dum la respubliko. Dum la enlanda milito li atingis la gradon de majoro. Militkaptito, li perfektigis sian esperanton, eklernitan 1932, en la malliberejo Model de Barcelono danke al tiel elstaraj samsortaj samideanoj kiel Frederic Pujulà i Vallès kaj Delfi Dalmau. Post sia liberiĝo li agadis en la subtera plenumkomitato de POUM, ĝis li ekziliĝis al Ĉilio, kie li daŭre aktivis en la esperanto-movado. Reveninte en Katalunio en 1964, li daŭrigis sian esperanto-aktivadon kaj ekverkis katalune, hispane kaj esperante. En 1976 li aniĝis en la Socialisma Partio de Katalunio kaj per ĝi elektiĝis magistratano de Castelldefels kaj membro de la Parlamento de Katalunio.

La urba biblioteko de Castelldefels portas lian nomon, omaĝe al tiu lignaĵisto, enmigrinta en Katalunio kvin-jara, kiu memlerne atingis diplomon pri instruisto de la kataluna lingvo, kaj verkis en tri lingvoj.

La aranĝo okazis je la 25a jariĝo de lia forpaso kaj oni prezentis novan verkon pri la omaĝito, entenanta biografion kaj liajn poemojn kaj novelojn. Partoprenis membroj de la nuna urbestro kaj de tiu, en kiu partoprenis Fernández Jurado. Kataluna Esperanto-Asocio estis invitita kaj partoprenis Víctor Solé kaj Martí Guerrero nome de la esperantistoj. Oni legis liajn poemojn katalune, hispane kaj esperante.

## MUZIKO KAJ PLANLINGVOJ

La programo “Trobades en el temps” de la klasik-muzika radiostacio Catalunya Música elsendis kuriozan programon ligintan muzikon kaj planlingvojn. Temis pri unu el la serioj de la semajna elsendo “Trobades en el temps”, en kiu laŭ ĉiufoje ŝanĝiĝanta rakont-fadeno ligita al sciencaj, politikaj aŭ artaj okazaĵoj oni disaŭdas muzikpecojn komponitajn en la koncertaj jaroj. La 22an de majo la fadeno estis planlingvoj kaj dum vagado tra volapuko, esperanto kaj ido oni elsendis verkojn de la fino de la 19a jc. kaj komenco de la 20a. Demandite de nia samasocio kaj ŝia kolego, Víctor Solé, pri la kialo de la elektotemo, la programestrino Carmina Malagarriga afable respondis, ke ŝi lernis esperanton antaŭ dudeko da jaroj, kiam ŝi estis studento, kaj, kvankam ŝi ne daŭrigis kaj forgesis ĝin, ŝi plu gardas plaĉan rememoron.

***La biblioteko-arkivo de KEA estis fondita surbaze de la granda librokolekto de Pere Nuez kaj de tiam regule pligrandiĝas, precipe sed ne nur, danke al heredaĵoj***

**FÒRUM SOCIAL CATALÀ**  
DEL 29 AL 31 DE GENER 2009 A LA SEU CENTRAL  
DE LA UNIVERSITAT DE BARCELONA

**VISITEU-NOS-HI, PARTICIPEU-HI!**

**FSCat** lo altre  
món es  
possible  
(Forum Social Català)

Dario Rodríguez

## INTERRETA RUBRIKO

La tutmonde uzata reta serĉilo Google aperigis la pasintan 15an de decembro esperantan flagon en sia logotipo. Klikante ĝin, aperis multnombraj ligiloj al paĝoj rilataj al Zamenhof kaj esperanto. Tiu fakto estigis ĉie grandan pligrandigon de la vizitoj al tiuj paĝoj. Eblas legi informon pri tiu elstara okazaĵo en la ret-revuo *Libera Folio*: [www.liberafolio.org/2009/google-festas-la-zamenhof-tagon](http://www.liberafolio.org/2009/google-festas-la-zamenhof-tagon)

La esperanta aŭtomata tradukilo Traduku.net, kiu jam entenis tradukprogramon angla-esperantan kaj inversen, aldonis tri novajn: kataluna, hungara kaj hispana al esperanto. La kataluna kaj hispana devenas el Apertium.

Adreso de Traduku.net: [traduku.net](http://traduku.net)

Adreso de Apertium: [www.apertium.org](http://www.apertium.org)

Esperanta rimaro estas kolekto da radikoj ordigitaj laŭ la finaĵo, kio povas multe faciligi la taskon al poemverkistoj: [eo.wikibooks.org/wiki/Esperanta\\_rimaro](http://eo.wikibooks.org/wiki/Esperanta_rimaro)

Vinilkosmo, la plej grava eldonejo de muziko en esperanto, ricevis dum la Universala Kongreso de esperanto en Bjalistoko la prestiĝan premion Onisaburo Deguĉi. Fotoj pri la transdono videblas ĉe la rekomendinda blogo de Vinilkosmo [vinilkosmo.ipernity.com](http://vinilkosmo.ipernity.com)

Aperis en la reto Hiphopa Kompilo. Temas pri dek unu kanzonoj en esperanto de pluraj artistoj, remiksitaĵoj far la fama brazila DJ (disko-prezanto) kaj komponisto Roĝer Borĝes. Ili estas indvidue elŝuteblaj senpage el la jena adreso: [www.ipernity.com/doc/rogerborges/album/141687](http://www.ipernity.com/doc/rogerborges/album/141687)

La kompleta albumo, laŭ ZIP-dosiero, elŝuteblas el la adreso: [hiphopesperanto.blogspot.com](http://hiphopesperanto.blogspot.com)

Legosalono estas retpaĝo, kiu informas aŭtomate kaj permane pri laste aperintaj interesaj artikoloj en esperantaj informoj, forumoj aŭ blogoj. Oni povas viziti ĝin en la jena adreso: [legosalono.blogspot.com](http://legosalono.blogspot.com)

La programisto Klivo Lendon, plurfoje menciita en antaŭaj eldonoj de ĉi rubriko, kreis novan programon Merkuro. Temas pri programo laŭ la stilo de la konata Messenger, sed kun ĉiuj menuoj kaj klarigoj en esperanto; ĝi estas bazita sur Ĝavo, kio ebligas ĝian funkciadon same en Mac, Windows aŭ Linux. La aŭtoro deziras ricevi komentojn pri ĝi precipe el aliaj esperantaj programistoj. Oni povas elŝuti ĝin per jena adreso: [purl.oclc.org/net/klivo/merkuro](http://purl.oclc.org/net/klivo/merkuro)

Lingvolanĉilo estas paĝaro rilata al la esperanta projekto sukcese eksperimentata en Britio "Springboard to languages" ["Saltotabulo al la lingvoj"]. Oni povas informiĝi en la adreso [egalite.freeweb.hu/salto/index.htm](http://egalite.freeweb.hu/salto/index.htm), en kiu aldone legeblas interesa eseo de Renato Corsetti pri la propedeŭtika efiko de nia lingvo ([www.freeweb.hu/egalite/salto/motivaro.pdf](http://www.freeweb.hu/egalite/salto/motivaro.pdf)).

Kreiĝis ankaŭ blogo pri la sama temo en [www.ipernity.com/group/71743](http://www.ipernity.com/group/71743)

Sergio Pokrovskij estas elstara rusa verkisto en esperanto, membro de la Akademio, loĝanta en Novosibirsk, Siberio. Unu el la temoj multe ŝatataj de li estas la diskuto pri la (laŭ li) superflua artikolo "la" en esperanto. Ampleksa eseo pri tiu temo, pri kiu okazis antaŭnelonge vigla diskutado en [soc.culture.esperanto](http://soc.culture.esperanto), videblas en la retpaĝaro Lingva Kritiko, konkrete en la adreso [lingvakritiko.com/2007/02/05/la-artikolo/](http://lingvakritiko.com/2007/02/05/la-artikolo/)

Forvo estas portalo, kiu aŭdigas la ĝustan prononcon de 269 533 vortoj en 220 lingvoj. La esperanta fako enhavas la prononcon de 2038 vortoj. Laŭ alfabeto ordo: [es.forvo.com/languages-pronunciations/eo/alphabetically](http://es.forvo.com/languages-pronunciations/eo/alphabetically)

Ĝi enhavas ankaŭ la prononcon de 4913 vortoj en kataluna lingvo: [es.forvo.com/languages-pronunciations/ca/alphabetically](http://es.forvo.com/languages-pronunciations/ca/alphabetically)

*La Karavelo* estas bela revuo esperantlingva, regule aperanta en la reto, sed ankaŭ prezentita laŭ libroforma kolekto kaj en DVD. Ĝia redaktoro estas la portugala esperantisto João José Santos. Jam aperis 19 numeroj, ĉiuj libere elŝuteblaj el la jena adreso, en kiu krome troveblas aliaj interesaj dosieroj: [www.lakaravelo.com](http://www.lakaravelo.com) □

## LASTE APERIS EN KIS-TV

### KISTV-SOCIO: LA SARDA LINGVO

Intervjuo al profesoro Diegu Corraïne pri la nuna situacio de la sarda lingvo. Diegu Corraïne (Nùgoro, 1949) estas tradukisto kaj fakulo pri la sarda lingvo. Li estis sekretario de la Sotziedade pro sa Limba Sarda ["Societo pro la sarda lingvo"], kaj direktoro de la eldonejo Papiros. Li interesiĝas pri la problemoj rilate al lingvo-politiko, terminaro kaj la normigo de la sarda. Li anas en la Observejo pri la Sarda Lingvo kaj anis en la komisiono, al kiu la sarda registaro taskis pretigi proponon de norma sarda lingvo, la t.n. Limba Sarda Unificada. Li estas la direktoro de la Ufizi de sa Limba Sarda ["oficejo de la sarda lingvo"] kaj kunordiganto de la

majstro-kurso pri "sarda tradukado kaj interkulturaj studoj", kreita en Nùgoro dum la kurso 2003–2004, fare de Provinco Nùgoro, la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kaj la Universitata Konsorcio de Nùgoro.

### KISTV-MOVADANOJ: KAPRIOL' EN BARCELONO

Intervjuo al Marita Kruijswijk kaj Marianne Nesse, Kapriol, kadre de la kon-

certaro Popolmuziko kaj Esperanto en Centre Artesà Tradicionàrius, Barcelono, aprilo 2009.

### KISTV-MOVADANOJ: DOUBLE UNU EN BARCELONO

Intervjuo al Françoise Rochette kaj Patrik Delabi, Double Unu, kadre de la koncertaro Popolmuziko kaj Esperanto en Centre Artesà Tradicionàrius, Barcelono, aprilo 2009. □

Francesc X. Puig Rovira

# FRANCESC GALCERAN FERRER, DEFENDANTO DE FERRER I GUÀRDIA



Ferrer i Guàrdia

**L**a 11an de julio 1909 komenciĝis en la haveno de Barcelono la enŝipigo de trupoj, cele Marokon, de multaj rezervanoj kaj filoj de laboristoj. Tuj komenciĝis ordo-perturboj sur la strato en klimato de popola koleto en la ĉefurbo kaj en la ĉefaj industriaj urboj de Katalunio. La 26an oni deklaris ĝeneralan strikon. En Barcelono, krom la propra karaktero de ribelo kontraŭ la regantoj, la movado fariĝis radikale kontraŭklerikala. La duono de la preĝejoj kaj konventoj en la urbo estis sturmitaj, pli-malpli okdek, el kiuj la duono estis bruligitaj. Okazis makabraj scenoj, kiel la profanado de tomboj, inter aliaj.

La urbo restis tute paralizata; oni starigis barikadojn sur la stratoj. La movado estis spontanea, popola kaj ĥaosa. La maldekstraj sindikatoj kaj la politikaj grupoj apogis la movadon, sed ne surpronis la direktadon. Paralele, la 26an oni deklaris la sieĝo-staton kaj la 28an la ĉesigon de la konstituciaj garantioj. Pli-malpli je la 28a alvenis en Barcelonon helpo-trupoj por fronti la ribelantojn. La 30an, la trupoj sufokis la lastajn fokusojn. La 6an de aŭgusto

*De aprilo 1908 ĝis oktobro 1911, en la loka ĵurnalo* Diario de Villanueva y Geltrú, *publikiĝis, preskaŭ ĉiusemajne, kolumno Sección Esperanta. La kolumno de la 2a de januaro 1910 komenciĝas per jena raporto: “Aperis flugfolio eldonita de la Esperantista Internacia Societo en Parizo, defende de Ferrer. Tiu flugfolio, kiu klarigas la senkulpecon de Ferrer, enhavas ekstrakton de la informo de lia defendanto, la nobla kapitano de inĝenieroj, nia samurbano, Francesc Galceran. Temas pri tre kurioza flugfolio, montranta la veran utilon de nia lingvo.”*

*Tiu informajo temas pri la broŝuro* La pledo por Ferrer (oktobro 1909), *eldonita en pluraj lingvoj laŭ oni povas konstati ĉe la katalogo de IISH (Internacia Instituto de Sociala Historio), serĉante laŭ aŭtoro “Galcerán Ferrer, Francisco”. La tradukinto al esperanto estis la Societo Libera Penso, kies membro estis Francesc Ferrer i Guàrdia. Okazas, ke Francesc Galceran estis frato de la esperantisto Gustau Galceran, estonta vicprezidanto de Kataluna Esperantista Federacio. Kion ni ne scias, estas, ĉu Francesc Galceran donis la tekstojn al sia frato kaj li liveris ĝin al Societo Libera Penso.*

*Okaze de la centjariĝo de la Tragika Semajno, en la semajna gazeto* Diari de Vilanova i la Geltrú *de la pasinta 14a de aŭgusto, aperis artikolo de la historiisto Francesc X. Puig Rovira kun titolo: “1909: Francesc Galceran Ferrer, defendanto de Ferrer i Guàrdia”, kiun ni prezentas ĉi-sube. Puig diras: “La kondamno de Ferrer Guàrdia deĉenigis internacian kampanjon de protesto.” Plej eble la esperantistoj de la 5a Internacia Kongreso kunvenintaj en Barcelono inter la 5a kaj la 11a de setembro, dum Ferrer i Guàrdia estis en la malliberejo, iel influis pri ĝi. Ni honoru ilin per la memoro.*

oni eksigis la provincestron, Ángel Ossorio y Gallardo, bonintenca homo, de kristandemokratia tendenco, kiu troviĝis superita de la okazaĵoj; li estis anstataŭigita per Evaristo Crespo Azorin.

En la unuaj tagoj de aŭgusto komenciĝis la reprezalioj fare de la registaro, kiu estis prezidata de la konservativulo Antonio Maura. Oni ilin aplikis malmilde, konsiderante ke estis necese ne sole restarigi la ordon, sed precipe malhelpi novajn perturbojn. Estis fermitaj la maldekstraj ĵurnaloj kaj la laboristaj centroj. La arestitoj kaj enprizonigoj estis preskaŭ du mil; laŭ la karaktero de tio, kion oni impunitis al ili, ili estis submetitaj al la civila aŭ al la milita jurisdikcio.

La milita jurisdikcio diktis dek sep mortopunojn, el kiuj kvin estis ekzekutitaj kaj la aliaj, komutitaj al dumviva enfermiteco. La civila jurisdikcio montris pli da mildeco, inter aliaj kialoj, ĉar ĝi agis pli malrapide kaj procedu- re pli rigore, kaj kiam ĝi verdiktis, post kelkaj monatoj, la etoso estis sufiĉe malsama.

**La movado estis spontanea, popola kaj ĥaosa. La maldekstraj sindikatoj kaj la politikaj grupoj apogis la movadon, sed ne surpronis la direktadon**



**“Deklaris ĉiuj  
malamikoj;  
oni kunigis ĉiujn  
anonimajn denuncojn;  
oni ekziligis ĉiujn  
personojn, kiuj povus  
ilustri nin pri la vivo;  
oni malakceptis ĉiujn  
pruvojn, kiujn mi  
proponis;  
mi ne sukcesis atingi,  
ke oni aŭdu  
la atestantojn,  
kiuj sin proponis”**

**“Francesc Ferrer  
Guàrdia, persekutita  
pro siaj raciismaj  
ideoj, pelita kaj sieĝita  
ĝis la lasta ekstremo,  
implikita iun tagon en  
abomeninda krimo,  
elportanta la fermon  
de liaj lernejoj kaj  
senĉese insultata  
de la partioj  
de la necedemo,  
nek kapitulacas,  
nek petas paŭzon”**

Francesc Ferrer Guàrdia estis unu el la plej konataj akuzitoj; instruisto, fondinto en la 1901 de la Moderna Lernejo, de tendenco raciisma kaj laika, oni lin akuzis esti “aŭtoro kaj estro de la ribelo”, kion nuntempe oni nomus intelekta aŭtoro. Oni diris, ke la aŭtoritatoj volis koncentri sur lin la subpreman kaj averto-donan agadon. Li kaŝiĝis en Alella, lia naskiĝa urbeto, kie la 31an de aŭgusto lin malkovris kaj arestis la loka milico, kiu tuj liveris lin al la polico. La guberniestro kondukigis la arestiton antaŭ sin. Post longa persona intervjuo, li komunikis al Ferrer, ke li sendas lin en malliberejon kaj ke li estos juĝita de milita tribunalo. Tuj li restis je la dispono de la enketa juĝisto, majoro de infanterio. La juĝo rapide pretiĝis. La enketa juĝisto ricevis deklarojn de multaj atestantoj.

La okazigon de la konsiliĝo de milito oni difinis por la 9a de oktobro, kvardek tagoj post la aresto. La militan tribunalon formis kolonelleŭtenanto de infanterio, kiel prezidanto, kaj ses membroj, kapitanoj de diversaj armeoj. La prokuroro estis kapitano de infanterio. La enketa juĝisto intervenis. La defendanto estis Francesc Galceran Ferrer, kapitano de inĝenieroj; ni okupiĝos pri li antaŭ ol daŭrigi la rakonton.

#### **Francesc Galceran Ferrer, defendanto**

Naskita en Vilanova i la Geltrú la 17an de oktobro de 1874, li estis filo de Demetri Galceran Cuscó, farmaciisto, posedanto de la apoteko de la placo Verdura n-ro 15, kiun li heredis de sia patro. Li laboris en ĝi la tutan vivon kaj transdonis ĝin al sia filo Gustau. Demetri Galceran estis erudiciulo, amiko kaj kunlaboranto de la liberala politikisto kaj poeto Víctor Balaguer. Famis la babil-rondoj de la apoteka postbutiko, preskaŭ ĉiutagaj, en kiuj, krom temoj de intereso kaj de loka politiko, oni traktis ankaŭ pri aliaj, kulturaj kaj artaj, kaj pri klaĉoj de la ĉiutaga vivo. La Galceran-oj estis familio de kuracistoj kaj farmaciistoj, de liberala tradicio en Vilanova i la Geltrú ekde la 18a jarcento.

Francesc estis la dua el la kvar filoj de Demetri kaj de Rosa Ferrer Armengol. Li eniris en la Ĝeneralan Militistan Akademion en aŭgusto 1892 kaj post unu jaro li pasis en la specialan de la korpuso de Inĝenieroj; en 1897, kun leŭtenanta grado, li estis destinita al la Regimento de Sapeistoj kaj Ministoj; en 1901 li estis destinita en Taragonon. La 29 de marto de 1903 li estis promovita al kapitano.

En la militaj juĝoj la defendo apartenis al oficiroj de la korpuso de Inĝenieroj, de diversa rango laŭ la kategorio de la akuzito. Galceran tiam estis kapitano de la 4a Miksa Regimento de Inĝenieroj de Barcelono. De ĉi tiu posteno

li estis interveninta kiel defendanto en aliaj okazoj antaŭ militaj tribunaloj. Al Ferrer i Guàrdia oni prezentis liston de la taŭgaj oficiroj por ĉi tiu funkcio kun la postulo, ke li nomumu defendanton; inter tiuj staris la nomo de Galceran. La akuzito manifestis: “Mi konas neniun el ĉi tiuj sinjoroj, sed iu ajn, mi pensas, utilos por defendi min bone; mi dezirus, tamen, trovi iun liberan pri religiaj antaŭjuĝoj, penetritan de la humanaj sentoj, kiujn mi celas per la eldono de miaj verkoj”. Antaŭ la insistado de la enketa juĝisto, Ferrer i Guàrdia elektis Galceran pro la koincido de la inicialoj de la familinomoj, kvankam en malsama ordo; oni diris ankaŭ, ke li rimarkis la koincidon de la antaŭnomo kaj de la dua familinomo Ferrer.

Al Galceran hazarde alfalis la rolo de defendanto en tiel unika proceso, kiu prezentiĝis kun malmultaj garantioj. Tamen, li pretiĝis la defendon kun plena konscienco, kun la tuta ebla zorgo, kvankam li disponis nur pri naŭ tagoj por argumenti ĝin kaj pri dudek kvar horoj por legi la sescent foliojn konsistigantajn la enketon.

La tribunalo konstituiĝas la 9an de oktobro je la oka matene. En ĉeesto de la akuzito la enketa juĝisto legas sian longan raporton. Poste intervenas iuj atestantoj. La akuzisto petas por la akuzito la mortopunon pro aŭtoreco de delikto de milita ribelo. Tuj poste intervenas la defendanto. Lia raporto komenciĝas per ĉi tiuj terminoj:

Mi devas antaŭ ĉio prezenti la cirkonstancojn, inter kiuj elvolviĝis la proceso kontraŭ Francesc Ferrer. Dum la enketo deklaris ĉiuj malamikoj; oni ricevis kaj kunigis al enketo ĉiujn anonimajn denuncojn, kiuj povis damaĝi lin; akumuliĝis kontraŭ li opinioj de aŭtoritatoj plimalpli konantaj la aferon; oni ekziligis ĉiujn personojn, kiuj povus ilustri nin pri la vivo, kutimoj kaj laboroj, al kiuj li sin dediĉis; krome, post la legado de la akuzoj, oni malakceptis ĉiujn pruvojn, kiujn mi proponis; mi ne sukcesis atingi, ke oni aŭdu la atestantojn, kiuj sin proponis, ĉar estis pasinta la leĝa limtempo, kaj mi trovas min kun finita proceso sen tio, ke eĉ unu solan momenton la konstanta kaj ekstrema intereso serĉi akuzon estis direktita al serĉado de la vero per sinturnado al personoj de la kontraŭa partio, kio ĉiel sukcesis makuli mian defendaton.

Sed tio, kion mi eldiras en la plej granda ebla trankvilo kaj en la maniero de protesto, neniel signifas, ke mi min prezentas antaŭ vi korpore kaj senarma.

La obstakloj duobligis miajn energiojn; tiuj min subtenis en la streĉa irado, kiun nekonataj interesoj min kondukis, kaj apogata kiel mi venas de la pravo, se miaj kapabloj respondas al mia volo, mi ne timas tion, kio ĉi tie povas okazi.

Sekvas analizo de la deklaroj de la atestantoj kolektitaj en la raporto de la enketita juĝisto, en kiu li konstatas, ke oni ne akceptis la atestantojn de la defendo, ke oni akceptis kiel validajn anonimajn denunciojn, ke la policaj traserĉadoj estis faritaj sen atestantoj kaj ke la dokumentaj pruvoj ne estis ekspertizitaj nek submetitaj al kontraŭdiro. Poste li parolas pri “la nedigna trudado, kiu de longe pezas sur ĉiuj por apartigi tiun proceson de la vero kaj de la racio”.

En la finaj alineoj de la raporto li diras:

Resume, sinjoroj: Francesc Ferrer Guàrdia, persekutita pro siaj raciismaj ideoj, pelita kaj sieĝita ĝis la lasta ekstremo, implikita iun tagon en abomeninda krimo, elportanta la fermon de liaj lernejoj kaj senĉese insultata de la partioj de la necedemo, nek kapitulacas, nek petas paŭzon. Sed anstataŭ komandi amasojn, li ilin edukas, serĉas la homojn, pelas kaj direktas la aliajn al la splenda fokuso de la racio, signalas la veran celon de la homaro, serĉas, havigas kaj distribuas la sciencon de la saĝuloj, kiel solan armilaron por liaj ribeloj.

Kaj se ni vidis detale, ke li partoprenis en la milita ribelo nek kiel estro nek kiel aktoro, kiu malfacilaĵo ekzistas por rekoni lian senkulpon? Redoni al li la liberecon, levi la juĝistan sekvestron pezantan sur liaj proprietaĵoj kaj lasi lin, por ke inter la brakumoj de sia familio li rakontu tie en la ekzilo kiel administras justicon la armeo. Mi ne devas kaŝi al vi, ke konsentante al mia peto, pridubos vian kuraĝon tiuj, kiuj, blindigite de la malamo, ne komprenas la justicon sen puno, sed ne devas pasi multe da tempo sen tio, ke ni vidos la racion, kaj ĉi tiuj nunaj blinduloj aplaŭdos vian firmecon. Kaj se pro misfortuno ĉesis lumigi ilin la lumo de la justeco por ĉiam, ne forgesu, ke larĝe kompensas lian maletimon la aplaŭdoj de la konscienco. Agu, do, laŭ ĝi; nenion plian mi petas.

Tuj poste, la akuzito faras mallongan deklaron. La konsilio de milito finas je kvarono antaŭ la unua; la tribunalo retiriĝas por interkonsiliĝi. Je la sesa kaj duono oni konas la verdikton: morto-punon por la akuzito, kiun oni komunikas al li. Tuj poste oni lin rajtigas komunikigi dum horo kun la publiko; la plej proksimaj fa-



*Barikado dum la Tragika Semajno en Barcelono*

milianoj ne povas ĉeesti; la edzino kaj la fratoj estas ekzilitaj en Teruelo; ĉeestas nur la patrino kaj unu fratino de la edzino. La verdikto de la konsilio de milito devas esti aprobita de la ĉefgeneralo de Katalunio, Luis de Santiago Manescau, kiu subskribas la aprobon la 10an de oktobro.

Tamen, la defendo povis influi malmulte en la elnodiĝo de la juĝo, kiu, laŭ oni diris, estis decidita antaŭ ol okazi. En la postaj tagoj la kapitano Galceran ricevas leterojn el diversaj personoj atestantaj favore al Ferrer i Guàrdia. La registaro ricevas multnombrajn peticiojn de forpardono, al kiuj ĝi ne konsentas.

La 11an je la dua nokte Ferrer Guàrdia estas translokita de la malliberejo Model al la kastelo de Montjuïc. La 12an noktomeze li ricevas konfirmon de la verdikto kaj rifuzon de la forpardono. La 13an je la naŭa matene oni ekzekutas la sentencon per pafmortigo fare de milita plotono. Ferrer Guàrdia estis 50-jara. Galceran proksimis al 35-jariĝo.

La antaŭajn tagojn Francesc Galceran helpis la kondamniton kaj tenis la komunikon kun la familio. Li sukcesis, ke li ricevis iujn vizitojn por adiaŭi kaj dikti sian lastan volon al notario, kiun li akompanis en ĉi tiu ago. Fidela al siaj konvinkoj, Ferrer Guàrdia forjetis la religian asistadon. Galceran pasigis kun li la lastajn horojn; Ferrer Guàrdia dankis lian agadon.

Galceran interrilatis kun la edzino kaj intelekta kunulino de Ferrer, Soledad Villafranca, tiam ekzilita en Teruelo, kaj li transdonis al ŝi leteron subskribitan de la kondamniton. La tagon post la morto li skribis al ŝi leteron de kondolenco, kiu diris:

***La kondamno de Ferrer Guàrdia elĉenigis internacian kampanjon de protesto, kiu kontribuis al la tuja falo de la konservativa registaro***



*Translokigo de Ferrer i Guàrdia dum lia kaptiteco*

**Preskaŭ neniu publikigis la raporton de la defendo; kun la celo propagandi, la parolado de la defendo interesis neniun**

Mi kore partoprenas vian doloron, kiun la misfortuno havigis al vi. Mi fidas, ke via sereneco de spirito donos fortojn por rezisti ĝin, kaj, precipe, sciante ke Ferrer, kiun mi akompanis en liaj lastaj momentoj, konservis ĉiam siajn konvinkojn kaj ke de liaj lipoj mi aŭdis, pli ol unu fojon, ke li bedaŭris morti nur pro tio, ke li devis forlasi vin. Mi ripetis mian sinceran kondolencon kaj proponas min por ĉio necesa.

La kondamno de Ferrer Guàrdia elĉenigis internacian kampanjon de protesto, kiu kontribuis al la tuja falo de la konservativa registaro, ignorinta la multnombrajn petegojn de indulgo, kaj al ĝia anstataŭigo per alia liberala la 19an de oktobro, ses tagojn post la plenumo de la verdikto. En Katalunio oni levis, aŭ provis aŭdigi, iujn voĉojn de indulgo kaj de pardono. Eĉ Joan Maragall, siatempe tre prestiĝa intelektulo, trovis obstaklojn por publikigi du artikolojn, poste tre diskonigatajn (“La ciutat del perdó” [“La urbo de la pardono”] kaj “L’església cremada” [“La preĝejo bruligita”]), en kiuj li petis komprenon kaj indulgon, kaj konkrete la forpardonon.

La nova registaro, prezidata de la liberalulo Segismundo Moret, inter siaj unuaj agoj, eksigis la ĉefgeneralon de Katalunio kaj anstataŭigis lin per Valeriano Weyler, nefleksema militisto kaj ankaŭ guberniestro, nomumita du monatojn antaŭe.

En la tujaj sekvaj jaroj oni eldonis multnombrajn librojn pri la juĝo al Ferrer i Guàrdia, kiuj donas interpretojn laŭ la tendenco de la aŭtoroj aŭ eldonistoj. Tiuj porregistaraj pretendas pravigi la kondamnon; la kontraŭaj evidentigis la malmultan rigorecon de la proceduro kaj la sendefendon de la akuzato. En ĉiuj oni transskribas fidele la skribaĵojn de la enketa juĝisto kaj de la akuzisto, sed preskaŭ neniu publikigas la raporton de la defendo; malfacilis al mi ĝin trovi. Tamen, kun la celo propagandi, la parolado de la defendo interesis neniun. Laŭ iuj ĝi pretendis malmunti la favorajn argumentojn por la kondamno kaj por la aliaj tiujn de sendefendo.

Tamen, en verko de tendenco porregistara, samepoka de la faktoj, oni povas legi: “Neniu advokato, kiu spontanee kaj volonte estis akceptinta la defendon de Ferrer, metus pli da varmeco ol tiu, kiun prezentis la kapitano sinjoro Galceran, al kiu ordono de la leĝo kaj hazarda elekto lin trudis tion”. Francesc Galceran plenumis konscie la rolon de defendanto. En malfavoraj cirkonstancoj, kun risko por la estonto de lia kariero, li defendis la akuzaton per la argumentoj, kiuj lin povus savi kaj kun la konvinko, ke li meritis tion.

En la sama monato oktobro 1909 oni komencis proceson kontraŭ Galceran pro “delikto de milita ribelo”. De la dokumentoj, al kiuj mi povis aliri, ŝajnas deduktiĝi, ke ĝi estis fermita sen sankcio. Galceran daŭrigis la militan profesion. En la familia medio oni diris, ke li estis malhelpata por postaj promocioj. Mi ne scias la etoson, kiun li trovis en la militaj instalaĵoj kaj la personan interrilaton kun la kunuloj. Oni povas kontroli, ke ĉiuj promocioj okazis pro antikveco; ne pro meritoj. En 1916 li promociis al majoro kaj la 8an de junio de 1920 al kolonelo-leŭtenanto, grado kun kiu inter 1921 kaj 1923 li milite kampanjis en Afriko kaj junio de 1931 li fariĝis rezervano. En la folio de oficialaj servoj aperas neniu malfavora noto. En 1917 oni donis al li la Krucon de Sankta Hermenegildo, kiun oni aljuĝas al la militistoj kun dudek kvin jaroj da servado sen iu ajn malfavora noto en la dosiero.

Li poste okupiĝis pri la familia vivo. En la geedziĝo li ne havis filojn. Li mortis en Barcelono la 4an de julio 1954. □

Tradukis kaj enkondukis: Joan Inglada



A Giridhar Rao

# DRETS HUMANS LINGÜÍSTICS A L'ÍNDIA: LA BRETXA ENTRE LA POLÍTICA I LA PRÀCTICA

## 1. L'Índia: El paisatge lingüístic

Quantes llengües es parlen a l'Índia? Bé, com en molts altres llocs del món, la resposta depèn de la font que es consulti. La base de dades *Ethnologue* en la seva edició de 2005 enumera 428 llengües per a l'Índia, 415 de les quals són “vives”. En canvi, l'investigador Annamalai considera que l'Índia té prop de 200 llengües gramaticalment distingibles (Annamalai, 2006).

D'altra banda, hi ha el cens oficial de 2001, les dades del qual el govern no va publicar fins el 2008. Segons aquest cens, l'Índia té 122 llengües. Però aquest és un número “racionalitzat” de manera complexa. Els enquestats van anomenar 6.661 llengües! Aquests més de sis mil noms d'idiomes es van racionalitzar en 1.635 “llengües maternes”. Després, aquestes llengües maternes foren classificades sota noms identificats com a llengües diferenciades per l'organisme governamental. Així l'hindi conté 49 llengües maternes. Només les designacions amb més de deu mil parlants són assignades a alguna “llengua materna” coneguda. Les designacions amb menys de deu mil parlants no es detallen, sinó que apareixen sota la indicació “altres llengües maternes” (GOI-a). Un cop més, en el cas de l'hindi, 14,7 milions de persones parlen aquestes “altres llengües maternes”! També cal tenir en compte que 1.957 designacions es van considerar “no classificades” perquè no es podien assignar a cap llengua. Tal com ens adverteix Annamalai, algunes d'aquestes poden ser llengües gramaticalment distingibles.

En qualsevol cas, cal aquest tipus de racionalització perquè el mateix idioma sovint té diferents denominacions en diversos llocs. A més, les llengües maternes sovint es confonen amb la regió, la religió, la casta, l'ètnia, etc. També es troben altres rareses: segons un investigador, en alguns censos es trobaven llengües que només parlaven homes i altres, només dones (Sarker, 1964, citat en Groff 2003)! És evident que cal seguir un cert ordre.



PETER DAVIS

Malgrat aquesta reducció, el país es manté multilingüe en molts camps. De les 114 llengües registrades el 1991, 104 es feien servir en emissions de ràdio; 87 s'empraven en la premsa i 13, en la indústria del cinema (Groff, 2003). El 1990, en el sector educatiu, 44 llengües eren o bé llengües d'ensenyament o bé eren una assignatura a les escoles del país. Tanmateix, cal tenir en compte que aquest darrer nombre s'ha anat reduint sense aturador de 81 llengües el 1979 a 67 (el 1976), 58 (1978), 44 (1990) i 41 el 1998. Si ens fixéssim només en les llengües d'ensenyament, les xifres són encara més inquietants: el 1999 n'hi havia només 33 al nivell elemental; 25, als cursos sisè i setè; 21 des del vuitè al desè curs i només hi havia 18 llengües d'ensenyament als cursos onzè i dotzè (Mohanty, 2006). Tornarem a parlar d'aquestes dades sobre llengües d'ensenyament.

Prop de tres quartes parts dels habitants de l'Índia parlen una llengua de la família del

**Els enquestats van anomenar 6.661 llengües, les quals es van racionalitzar en 1.635 “llengües maternes”. Després, aquestes llengües maternes foren classificades sota noms identificats com a llengües. Així l'hindi conté 49 llengües maternes i l'Índia té 122 llengües**

sànskrit, prop del 20% parlen llengües dravídiques i la resta parlen llengües de les famílies austroasiàtica i tibetobirmana. Es poden trobar almenys deu sistemes d'escriptura diferents al país. A més, l'Índia té en total 23 llengües "oficials". Aquestes 23 cobreixen prop del 96% de la població; la resta són parlades per menys del 4% dels indis. Però fins i tot un 4% és una gran quantitat en un país amb més de mil milions de persones: efectivament, moltes llengües minoritàries tenen més d'un milió de parlants; per exemple 9,6 milions de persones parlen la llengua indígena bhili!

## 2. Polítiques lingüístiques i garanties jurídiques

En un país amb profundes desigualtats històriques també hi ha una asimetria lingüística evident –i gens sorprenent. Tanmateix, havent escollit ser una democràcia laica, ja l'any 1959 la constitució de l'Índia i diversos organismes estatals van reconèixer la necessitat de protegir les llengües petites. Vet aquí alguns projectes que va enumerar la Comissió per les Minories Lingüístiques del govern (GOI-CLM-41 2004):

1. Els ciutadans de l'Índia que tinguin una llengua, un sistema d'escriptura o una cultura diferenciades tenen dret a conservar-les.
2. Tots els ciutadans tenen dret a adreçar-se a l'estat en el seu propi idioma i el dret que l'estat els respongui en el mateix idioma.
3. Declaració de la llengua minoritària com a "segona llengua oficial" en els districtes on més del 60% de la població la parli.
4. Traducció i edició de totes les normes i anuncis importants a cadascuna de les llengües que siguin parlades per més del 15% de la població a nivell subestatal o de districte.
5. No obligació que els aspirants a un treball públic parlin la llengua principal de la regió; la poden aprendre més tard.
6. Totes les minories, ja siguin religioses o lingüístiques, tenen el dret a endegar i administrar institucions educatives a voluntat.
7. L'educació elemental en una llengua materna, cosa que, lògicament, im-

plica la contractació de professors i l'adquisició de material educatiu en aquesta llengua.

## 3. Perills en què es troba la diversitat lingüística

Veient el gran nombre de llengües, la seva vigència en diversos àmbits del país i les diferents estratègies jurídiques de protecció, és fàcil preveure els diversos perills en què es troba la diversitat lingüística a l'Índia.

### 3.1. Perill pel baix nombre de parlants

Un perill resulta del baix nombre de parlants. Encara que moltes llengües de les minories tenen centenars de milers de parlants, al país hi ha moltes llengües amb molt pocs parlants: un informe recent parla de més de cent llengües en perill (Dasgupta, 2007; però es parlarà més sobre aquesta xifra més endavant). Aquestes són especialment vulnerables per les catàstrofes tant naturals com humanes. En aquest context, cal mencionar la mort del rei Jirake de les illes Andaman i Nicobar. Després de salvar-se com per miracle d'un tsunami el desembre de 2004, Jirake i els 49 habitants de la seva tribu es van allotjar en un hostel a la capital regional Port Blair. Allà va morir Jirake, quatre mesos després del terrible tsunami.

Era el darrer de la tribu que coneixia les deu variants de la llengua gran-andamanesa. Segons es diu, no més de divuit integrants de la tribu coneixen el gran andamanès i un lingüista va poder censar només sis parlants de gran andamanès el juliol de 2007 (Avtans, 2007). Segons els investigadors, Jirake també coneixia llengües de tribus desaparegudes: una lingüista de Nova Delhi col·laborava amb ell per compilar un diccionari trilingüe –en gran andamanès, en hindi i en anglès. Per això no només la gent de la seva tribu va lamentar-ne la mort, sinó també moltes altres persones. La història esdevé encara més tràgica, ja que hem sabut que en aquella tribu s'abusava exageradament de l'alcohol (Rao, 2005a).

Certament, aquest conjunt de problemes són evidents en molts pobles indígenes al món. La trajectòria es coneix prou bé. Al principi hi ha la desaparició de l'hàbitat per necessitats "evolutives" i per la pressió d'un estat que s'intenta adaptar a la globalització ràpidament i salvatgement. Aquesta destrucció de l'hàbitat transfor-

ma la comunitat indígena radicalment d'usuaris sostenibles dels recursos naturals en explotadors involuntaris de la natura. Aviat deixen el bosc i es converteixen en allò que s'anomena "refugiats ambientals", els quals ara han de trobar un lloc a la perifèria de la societat dominant, on viuen en condicions deplorables de misèria i perden a poc a poc tot el capital social i cultural que tenien just una generació abans. Vet aquí un exemple de la relació directa entre la destrucció del medi i de la llengua.

### 3.2. Perill per motius políticoreligiosos

Però també les llengües menys vulnerables afronten perills. Per exemple, una llengua diaspòrica, no indígena, –fins i tot "oficial"– com l'urdú (amb 51,5 milions de parlants el 2001), es troba enmig de les confrontacions políticoreligioses entre hinduistes i musulmans a l'Índia. Efectivament, ja des del 1837, quan el govern colonial va substituir el persa per l'urdú com a llengua oficial al nord de l'Índia, es fa enfortir el conflicte políticolingüístic entre l'hindi i l'urdú. El 1900 es van declarar ambdues llengües com a oficials, en igualtat de condicions. Gandhi va argumentar enèrgicament que es tractava realment de la mateixa llengua –la qual després va anomenar "hindustànic"– escrita de dues maneres diferents. Ja el 1908 va declarar que "l'idioma universal per a l'Índia hauria de ser l'hindi amb la possibilitat d'escriure'l en els alfabetos persa o devanagari" (Gandhi, 1908, 80).

